

**JURA
TRIBUNO
INTERNACIA**



N-ro 24

Jaro 2025

Internacia Jurista Esperanto-Asocio

ISSN: 3101-2965



Eldonita de Internacia Jurista Esperanto-Asocio
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Poŝta adreso: Jura Tribuno Internacia
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

ret-adreso: jurista@esperanto.ac

Direktoro: José M. Rodríguez
Kunlaborantoj: M^a Rafaela Urueña Álvarez (Hispanio)
Miguel Faria de Bastos (Portugaliao)
Alejandro Burgos Escalante (Hispanio)
Jeremiah Stoddard (Usono)
Swietosław Fortuna (Pollando)
Nelson di Blanco (Argentino)

ENHAVO

Justico el dialogo en la nuntempa mondo	3
Vivo de la Asocio	5
Eksterjusticaj ekzekutoj fare de Usono en la Kariba Maro	9
Artefaritaj insuloj kaj Internacia Mar-juro	18
Kelkaj pripensoj pri Juro kaj la arto rakonti. Rencezo pri “La Rakontanto” de Walter Benjamin.	26
Juraj Informoj	31
Krimoj en la Antarkta Kontinento	37
Novelo: <i>Kiam la mano de Dio elektis</i>	40
Jura Vortaro	45
Galerio de Elstaraj Juristoj “Józef Litauer”	47
Kino kaj Juro “La proceso kontraŭ la 7 de Ĉikago.”	48
Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la rajtoj de Indiĝenaj Popoloj	50
Aliĝo al IJEA	62

Justico el dialogo en la nuntempa mondo

Antaŭ kelkaj jaroj, Chile Eboe-Osuji, juĝisto ĉe Internacia Punkortumo asertis, ke en la nuntempa mondo Justico ne nur estas ebla, sed ankaŭ fundamenta elemento por atingi pacon kaj komunan disvolviĝon.

Pravas juĝisto Eboe. Ene de la aktuala mondo, kie ŝtatestroj ofte agadas senpune, ĉiopovaj ŝtatoj regule malobservas la internacian leĝaron kaj la internaciaj organizoj fonditaj por defendi la universalan ordon sufokiĝas sub burokrata maro, nur justico estas la voĉo kiu memorigas la mondon, ke freneziĝo ne estas taŭga fino.



Juĝisto Chile Eboe-Osuji

Justico estas renkontejo celanta stimuli pacon kaj mondan stabilecon, ĉar ĝi instigas kooperadon inter ŝtatoj kaj pacan solvon de konfliktoj. Justico naskiĝas el dialogo, kiu helpas al ni konstrui multkulturan kaj pacan socion, kie ĉiuj ni povos vivi. Tamen, kio estas necese por ekdialogi?

Proklamas teksto¹ de religio disvastigita tra la tuta mondo: *Trovu vorton komunan por vi kaj por ni*. Jen simpla, sed profunda eldiraĵo. Por ekdialogi kun aliuloj unue estas necese trovi vorton komunan. Al tiu komuna vorto sekvas pliaj, ĝis la atingo de kompleta dialogo komprenata de ĉiuj. Konsentite ke dialogo ne ĉiam signifas akordon, tamen neniu akordo estos atingebla se unuamomente oni ne parolas, prefere je la sama nivelo. Alie, dialogo helpas preventi ne-justaĵojn, ĉar ĝi helpas pritrakti problemojn antaŭ ol ili fariĝos pli grandaj kaj gravaj konfliktoj.

Alia grava afero estas, kie dialogi? Respondo povas ŝajni tute klara, dialogo nepras sur ĉiuj internaciaj scenejoj. Tamen, lastatempe burokrataĵoj

1. Korano. Ĉapitro 3:64.

inundis la instituciojn, kiuj naskiĝis por favorigi dialogojn kaj certigi pacajn solvojn al konfliktoj. Deklaris iam Anthony Banbury, eksa asista ĝenerala sekretario de Unuiĝintaj Nacioj: "mi amas UN, tamen la institucio fiaskas. Abundas burokrataj aferoj kaj mankas rezultoj. Plejmulto el decidoj estas adoptataj laŭ politikaj kialoj, anstataŭ pro la valoroj kaj celoj de la organizaĵo. Por ke Unuiĝintaj Nacioj daŭriĝu kaj prosperu, estos necesa kompleta transformado de la institucio."

Tamen, malgraŭ malperfektaĵoj pli validas la taskoj celitaj de UN ol tiuj de la "Konsilio de Paco", pripensita kaj proponita de la Prezidanto Trump, kiu vole-nevole deziras dezajni mondon laŭ perspektivo de ununura ŝtato, aŭ de ŝtatestro.



Eble, la kerno de tutmonda dialogo, celanta universalan justicon, troviĝas sur tiuj internaciaj organizaĵoj apartenantaj al UN-sistemo. Ili pritraktas specifajn aferojn, ne tiel ĝeneralajn kiel tiu de Unuiĝintaj Nacioj. Pro tio, dialogoj pli konkretaj povus trovi sukcesan agadkampon en tiaj organizaĵoj.

Kaj por trovi tiun *vorton komunan* en tiuj institucioj, la internacia lingvo Esperanto estas preta por havigi al ĉiuj ĝustan terminaron por kompreni kaj komprenigi klarajn mesaĝojn al dialogantoj. Ni, kiel esperantistoj kaj juristoj, estu pretaj por montri al ĉiuj niaj kolegoj, ke ni disponas pri la plej taŭga instrumento por tiu internacia dialogo, kie Justico povus disvolviĝi efike.



Vivo de la Asocio

► IJEA partoprenis en la Movada Foiro.

Advokato Swietosław Fortuna, estrarano de nia asocio, prizorgis la giĉeton de Internacia Jurista Esperanto-Asocio, dum la Movada Foiro okazanta kadre de la pasinta Universala Kongreso en Brno. Li interparolis kaj respondis demandojn de interesitoj pri nia asocio. Oni disdonis al vizitantoj broŝurojn pri IJEA kaj ankaŭ bombonojn, afable havigitajn de Jura Konsilanto Fortuna. Sendube alloga kaj delica prezentado de nia asocio antaŭ la tutmonda esprantistaro.



→ S-ro Ewald Schick, prezidanto de Aŭstria Esperanto-Federacio kaj Jur. Kons. Swietosław Fortuna ĉe la Movada Foiro dum la UK de Brno (Ĉeĥio)

► Ĝenerala Asembleo de IJEA.

La pasintan 1-an de aŭgusto 2025, je la 9-a horo, kadre de la Universala Kongreso de Esperanto okazinta en Brno, nia asocio organizis sian ĉiujaran Ĝeneralan Asembleon. Ĉeestis 15 membroj kaj simpatiantoj de la jurista asocio. Unue, okazis prelego de Jura Konsilanto Swietosław Fortuna pri la temo "Diversaj aspektoj de aŭtoasekuroj en Pollando kaj en Eŭropa Unio". Poste, S-ro Fortuna, estrarano de IJEA laŭtlegis jenan raporton de la prezidanto pri la nuntempa situacio de la asocio, agadoj pasintaj, projektoj, membraro kaj financa raporto:

"Nia asocio aktive partoprenis en la pasinta Universala Kongreso en la urbo Aruŝo (Tanzanio). Estrarano de la asocio, Advokato Miguel Faria de Bastos respondecigis kaj de la Movada Foiro kaj de la organizado de la asembleo. Bedaŭrinde reklamiloj pripensitaj por la Movada Foiro, ne alvenis ĝustatempe en la kongresejon, kaj pro tio ne estis eble disdoni informajn broŝurojn pri la asocio.

Malgraŭ tiu malfacilaĵo Advokato Faria de Bastos akurate respondis ĉiujn demandojn de interesitoj dum la Movada Foiro. Okaze de la Asemblo de la jura asocio S-ro Faria de Bastos prelegis pri la temo “Internaciaj Tutafrikaj Tribunaloj”.

Dum la jaro 2024 oni eldonis numeron de “Jura Tribuno Internacia”, kiu estos disdonitaj al ĉiuj interesitoj dum ĉi tiu Kongreso. La revuo enhavas 60 paĝojn kaj ene de ĝi estos eble trovi la kutimajn sekciojn. Pri nia informilo “Jura Semajno”, ne estis eble daŭrigi la eldonadon pro leĝa afero, tiel, kiel sciante, tiu informilo estas dissendita al ĉiuj membroj de la asocio kaj interesitoj pri juraj aferoj. Tamen, pro la fakto, ke temas pri sendado de materialo pere de ret-adresoj, laŭ la Eŭropa juro estas necese disponi pri la akcepto de la ricevanto. Do, antaŭ ol denove eksendi la bultenon “Jura Semajno” ni devos peti tiun akcepton al la ricevantoj. Espereble, la afero solviĝos kiel eble plej baldaŭ.

Pri la membraro de IJEA, ĉi-jare oni profitis por aktualigi la nombron da membroj, la rezulto estas iomete pli ol 50 membroj, kvankam bedaŭrinde ne ĉiuj abonas akurate la kotizon. Nur memori, ke la kotizo ne pli-altiĝas de antaŭ multaj jaroj, la mon-kvanto estas vere malalta, nur 7 aŭ 14 eŭroj, studentoj senpage. Do, oni petas al tiuj kiuj deziras kunlabori kun IJEA aboni akurate la kotizon. Malgraŭ tio, estas necese agnoski, ke dum la unuaj monatoj de la jaro 2025, oni atingis pli altan ricevon de abonoj ol kutime.

Pri la financa situacio de la asocio jen la konto-stato:

Enspezoj		Elspezoj	
Kotizoj	117 €	Luado de salono	45 €
Donaco	200 €	Kotizo faka asocio UEA	44 €
		Eldonado de revuo	150 €
Entute	+ 317 €		- 239 €
Rezulto:	+ 78 €		
En la kaso de la asocio je la 1-a de aŭgusto 2024:			534,82 €
Nuntempe la asocio disponas pri		534'82 + 78 =	612,82 €

► Agad-programo de IJEA - Septembro 2025 / Julio 2026

La estraro de la jurista asocio aprobis jenajn agadojn realigeblajn ĝis la okazigo de la venonta asembleo en julio 2026:

- ĉiusemajna eldono de la bulteno "Jura Semajno".
- Eldono de du numeroj de "Jura Tribuno Internacia".
- Eldono de libro pri jura temo.

► Frata asocio Unio Internacia de Advokatoj Esperantlingvaj sendas al ni jenan sciigon:

La estraro de UIAE (prezidanto: Miguel FARIA DE BASTOS), ekde sia fondiĝo, klopodas anigi al si advokatojn esperantlingvajn surbaze de plano (eble tro ambicia) ekhavi membraron de pli ol duono de la landoj reprezentitaj en la Organizo de Unuiĝintaj Nacioj, minimume pounu el ĉiu lando. Tiuperspektive, ĝi havas membrojn el ĉiuj kontinentoj (rekordo: ses el Angolo), sed la celata nombro po-landa estas tre malproksima de tiu plano.

La ĉefa strategia ideo estis kaj estas videbligi UIAE-n antaŭ la eksteraj cirkloj de Advokato-Ordenoj, Ordenaj Federacioj, internaciaj kaj plurnaciaj Asocioj, ktp, pere de ret-korespondado, reciproka ŝanĝado de konsideroj kaj ideoj, surscena simulado de juĝaj aŭdiencoj, en Esperanto, kunorganizado de prelegoj kaj kolokvoj kun samtempa tradukado de Esperanto al la naciaj lingvoj de la tieaj eventoj, tiumaniere ke la neesperantaj advokatoj povu, surbaze de interrilatiĝo, leksikografia paralela instruado, interlingvistika komparado de juraj terminoj, spektado de esperantlingvaj juraj sesioj, ktp, konscii ke Esperanto povas funkcii utile kaj efike en la juraj medioj kaj apud tribunaloj (inkluzive de arbitraciaj tribunaloj).

La unua elektita vicprezidanto akceptis redakciestri internan revuon, eble dulingvan (ekz., esperanta kaj angla, por plifaciligado de la propagando), samkiel tiu de Frankfurto, (esperanta kaj germana), sed, poste, pro personaj motivoj, li demisiis kaj ne plu iu ajn aperis preta anstataŭi lin.

Malgraŭ tio ke la aniĝ-kotizo kaj la an-kotizoj ne estas devigaj, tio ke la aniĝ-propagando estis okulfrapa, inkluzive en la ĉiujara Monda Foiro kaj en similaj eventoj, kaj tio ke allogaj prelegoj estis faritaj frame de UIAE, la nombro de asocioj preskaŭ ne kreskis kaj la asocio stagnas. Disvolviĝas nuntempe premkampanjo cele al tiu kreskado.


Stranga fenomeno estas tiu ke E-advokatoj el malsamaj landoj aperas ne malofte opiniante ke la plano de UIAE ŝajnas interesa kaj priekzameninda. Kelkaj el ili pripensas la eblecon aniĝi de antaŭ pli ol unu jaro kaj ankoraŭ ne decidis ĉu eniri aŭ ne.

La estraro invitas kaj atendas vin. Kontakto per la adreso:

mfb@debastosadvogados.com

Estu bonvena. Kore via

Miguel Faria de Bastos



Τέσσερα χαρακτηριστικά αρμόζουν στον δικαστή: ακούειν ευγενώς, αποκρίνεσθαι σοφώς, σταθμίζειν φρονίμως και κρίνειν αμερολήπτως.

SOKRATO (470 aŭ 469 a.K / 399 a-K.)

Klasika helena filozofo, kiu estas konsiderata unu el la ĉefaj fondintoj de okcidenta filozofio.

Kvar kvalitoj konformas al juĝisto: aŭskulti ĝentile, respondi saĝe, konsideri prudente kaj decidi senpartie.

Eksterjusticiaj ekzekutoj fare de Usono en la Kariba Maro

Jeremiah Stoddard (Usono)

La 2an de septembro 2025, la usona mararmeo pafis kontraŭ malgrandan boaton en la suda Kariba Maro, mortigante 11 pasaĝerojn. Laŭ la usona registaro, la pasaĝeroj estis membroj de la delikta bando el Venezuelo, *Tren de Aragua*, kaj ili estis transportantaj drogojn al Usono. Kelkajn tagojn poste, je la 15a de septembro, la mararmeo detruis alian boaton mortigante ties tri pasaĝerojn, kaj la usona registaro donis la saman kialon pri perfortemaj bandoj kaj transporto de drogoj. Ni ĉi tie pritraktos la demandojn pri la permeso aŭ malpermeso de tiuj agoj laŭ usona kaj internacia juroj.



Boato en la Kariba Maro, kelkajn sekundojn antaŭ ol esti detruita fare de usonaj armiloj

Kaj usona juro kaj internacia juro malpermesas eksterjusticiajn ekzekutojn. Artikolo 6 (1) de la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj defendas la rajton je vivo: "*Ĉiu homo havas esence propran rajton je vivo. Tiu rajto estu jure protektata. Neniu persono estu arbitre senigita de sia vivo*". Artikolo 14 postulas pruvon de kulpeco antaŭ tribunalo antaŭ kondamno kaj puno pro krimo. Similaj rajtoj aperas en la kvina amendo de la Konstitucio de

Usono: "*Neniu homo estu... senigita de vivo, libereco, aŭ propraĵo, sen justa jura proceso*". Se temas pri atako kontraŭ alia ŝtato, tio estas malpermesita de Artikoloj 2(3) kaj 2(4) de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj; la nuraj permesitaj esceptoj estas en kazo de ago aprobita de la Sekureca Konsilio, laŭ artikolo 42, kaj sindefendo, laŭ artikolo 51. Tamen, artikolo 51 permesas perfortan sindefendon nur en la kazo de armita atako de alia ŝtato. Tiukaze, la juraj

principoj de *jus ad bellum* (justa komenco de milito) kaj *jus in bello* (justa konduto dum milito) aplikeblas, inkluzive de internacia humaneciga juro. Tiuj principoj malpermesas mortigon de civiluloj, kaj krome malpermesas mortigon ĝenerale ekster milita neceso, t.e., ŝtato ne rajtas mortigi nearmitan homon, kiu ne aktive partoprenas en batalado.

La rajtoj kaj devoj en la internaciaj paktoj subskribitaj kaj ratifitaj de Usono formas parton de la usona nacia leĝaro laŭ Artikolo 6 de la Konstitucio de Usono. La federacia leĝaro de Usono, sekcio 28 U.S.C. § 1350, permesas alilandanojn procesi en usonaj federaciaj kortumoj kontraŭ malobeco de kutima internacia juro kaj traktatoj ratifitaj de Usono. Eĉ se ĉi-lastata leĝo ofte estas nura formalajo ne reale efektivebla -ekz. en *Al-Aulaqi v. Obama* la kortumo rifuzis juĝi aferon de usona civitano en eksterlando, kiun la registaro nomis teroriston kaj celis mortigi sen juĝo- ĝi montras, ke la usona nacia leĝaro rekonas la validecon de internacia humanicega juro kaj internacia juro de homaj rajtoj.



Sed kiu juro aplikeblas? Ĉu humaneciga juro, aŭ ĉu juro pri homaj rajtoj? Laŭaspekte ne estas milito inter Usono kaj Venezuelo, aŭ inter Usono kaj *Tren de Aragua*, do unuavide ŝajnas, ke la eksterjusticaj ekzekutoj ne estas temoj de internacia humaneciga juro. La afero tamen estas prikonsiderinda.

Temas pri atako fare de usona militistaro. La atako okazis kie Usono pliigas milistaran ĉeeston kaj aktivecon -almenaŭ ok usonaj militŝipoj estas en la suda Kariba Maro, kun kelkaj aviadiloj kaj almenaŭ unu submara ŝipo-. Laŭ militistoj, estas miloj da mararmeanoj tie, kaj pliaj miloj da anoj de la marista infanterio. La usona prezidanto kaj liaj subuloj deklaras, ke Nicolás Maduro ne estas laŭrajta prezidanto de Venezuelo kaj asertas, ke la drogtransportaj bandoj estas subtenataj de lia registaro. La venezuela prezidanto nomas tion "la plej

granda minaco vidita sur nia kontinento en la lastaj 100 jaroj" kaj anoncis sendadon de 4.5 milionoj da militistoj ĉirkaŭ la lando por "defendi niajn marojn, ĉielon kaj terojn". Kelkaj komentistoj kredas, ke la minacoj kaj agoj de Usono en la regiono temas pri serĉo de pravigo por milito kontraŭ Venezuelo.

Estas evidente, ke post la dua mondmilito Usono partoprenis multajn nedeklaritajn militojn. Sendube la atakoj kontraŭ boatoj, kiuj laŭ la usona registaro estas subtenataj kaj gvidataj de la venezuela registaro, povas esti konsiderataj kiel militan agon, atakojn kiuj formas unuajn paŝojn de nedeklarita milito, kaj do temas pri eventualaj malobeoj de la leĝoj pri milito. En tiu okazo, interesus nin internacia humanicega juro, inkluzive de la krimo de agreso kaj la malpermeso de mortigo de civiluloj aŭ nebatallantoj. Tamen, ĉar la milito ne estas deklarita, kaj ne ekzistas kialo pensi, ke ne temas pri civiluloj ankaŭ la juro pri homaj rajtoj aplikeblas, precipe pri la rajto je vivo kaj la malpermeso de eksterjusticaj ekzekutoj. Ni do konsideros la faktojn kadre de tiuj du flankoj de la juro.

Kiel antaŭe menciita, la situacio temas pri du¹ boatoj detruitaj de la usona mararmeo, kaj iliaj pasaĝeroj mortigitaj. La usona registaro asertas, ke la pasaĝeroj estis danĝeraj teroristoj, kiuj estis transportantaj drogojn al Usono, kaj ĝi minacas pri pliaj tiaj atakoj kontraŭ aliaj boatoj. Laŭ raportoj, la usona prezidento subskribis sekretan ordonon al la



Usona ŝiparo en la Kariba Maro

militistaro uzi forton kontraŭ drotransportaj bandoj, kiujn li antaŭe nomis terorismajn. Tamen, ne estas klare, ĉu vere temas pri droboatoj kaj membroj de delikta bando, aŭ kiel kelkaj ĵurnalistoj kredas, ĉu temas pri nuraj migrantoj. Precipe mankas pruvoj, ke drogoj aŭ armiloj troviĝis en la boatoj.

La usona registaro provas pravigi siajn agojn kiel sindefendon. Marco Rubio, ministro pri eksterlandaj aferoj, asertis ke Usono "havas la rajton elimini

1 Noto de la Redakcio: en la momento eldoni la revuon tiu nombro jam estas pli alta ol 30.

tujajn minacojn al Usono". Anna Kelly, proparolanto por la Blanka Domo, eĉ nomis la atakojn "kolektivajn sindefendon". La ĉi-supre menciita Artikolo 51 de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj tamen rekonas sindefendon nur kontraŭ agresanto, kiu unue faris "armita[n] atako[n] kontraŭ Membro de la Unuiĝintaj Nacioj".

Krom la asertoj, ke la mortintoj estas teroristoj el delikta bando, kaj ke temas pri sindefendo, la usona registaro ne provas pravigi la laŭleĝecon de siaj agoj, kaj rifuzas prezenti pruvojn pri tio, ke la boatoj transportis drogojn aŭ la homoj en ili estis membroj de *Tren de Aragua*. Demandita de ĵurnalisto pri kiel li sciis kiuj estis kaj kion faris la boatoj, Pete Hegseth, la usona ministro pri defendo, respondis, "Kial mi dirus tion al vi?" Aliaj postuloj de la amaskomunikilaro, kaj eĉ de membroj de Usona Kongreso, pri pruvoj pri la afero estas ĝis nun rifuzitaj. En la socia reto X (antaŭe nomita Twitter), JD Vance, usona vicprezidanto, skribis: "Mortigi kartelanojn, kiuj venenas niajn civitanojn per drogoj, estas la plej alta kaj plej bona uzo de nia militistaro". Respondis Brian Krassenstein, konata komentisto en tiu retejo, ke "Mortigi la civitanojn de alia nacio, kiu estas civiluloj, sen kiu ajn jura proceso, nomiĝas militkrimo". Tuj respondis la vicprezidanto: "Valoras merdon al mi, kiel vi nomas ĝin".



Skribaĵoj de JD Vance sur la socia reto X

Ne estas aserto nek pruvoj, ke Venezuelo atakis Usonon, nek asertoj nek pruvoj, ke la boatoj atakis aŭ eĉ minacis la multe pli potencajn usonajn militŝipojn. Eĉ se ni supozas, ke la boatoj estis transportantaj drogojn al Usono, ĉu tio temas pri armita atako laŭ Artikolo 51 de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, kiu permesas sindefendon? Drogoj ja kapablas mortigi, kaj ja mortigas multajn homojn ĉiujare. Tamen, taksu drogojn kiel armilojn, kaj vendadon de drogoj al

usonanoj kiel atakon ŝajnas pliampleksigi la rajton de ŝtatoj uzi perforton, aŭ alivorte, malpliigi la difinon de "agreso" kaj malpermesita uzo de forto en internacia juro tiel, ke atakoj kaj eksterjusticaj ekzekutoj ne estas malpermesitaj se la viktimoj transportas drogojn. Tio evidente kontraŭas la celojn de Unuiĝintaj Nacioj kaj malpliigas la efikecon de ĝia ĉarto kaj la Internacia Pakto pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj por certigi kaj defendi pacon. Tio sola sufiĉus por rifuzi tiun interpreton. Sed ni aldonu, ke vendado de drogoj ne povas esti formo de "armita atako" laŭ la kutima interpreto de la termino. Ĉar "armita atako" estigas escepton al la malpermeso de "uzo de forto" (t.e., perforto) en Artikolo 2(4) de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, estas subkomprenite, ke "armita atako" nepre devas same enhavi ian uzon de forto. Tiele oni kutime interpretas la terminon "armita atako" kadre de internacia juro. La agoj de Usono en la Kariba Maro do ne temas pri sindefendo laŭ internacia juro. Krom tio, usonaj oficialuloj ne defendas la leĝecon de la atakoj, sed male eĉ mokas internacian juron, kiel oni vidas en la suprecititaj komentoj de JD Vance.



Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj

La boatoj ne estis militŝipoj, la pasaĝeroj ne militistoj. Ilia morto do ŝajne estis eksterjustica ekzekuto kontraŭa al la internacia juro pri homaj rajtoj. Tamen ankaŭ temas pri la usona militistaro, kaj la cirkonstancoj inkluzivas pliigon de militŝipoj kaj militistara aktiveco ĉirkaŭ Venezuelo, kiu reciprokas per militistara aktiveco. Usono plue asertas, ke la venezuela registaro gvidas kaj subtenas *Tren de Aragua*. Do inter minacoj kaj la agoj de la usona mararmeo, la afero povas temi pri agoj de nedeklarita milito, kaj do ankaŭ militkrimoj, inkluzive de agreso kaj mortigo de civiluloj.

Ĉiuokaze, apenaŭ povas ekzisti dubo, ke la agoj de la usona mararmeo kontraŭ civilaj boatoj en la Kariba Maro estas malpermesitaj de internacia kaj usona juro ĉu laŭ juro pri homaj rajtoj aŭ ĉu laŭ kaj juro pri homaj rajtoj kaj humaneciga juro. Sed kiujn rimedojn la internacia komunumo disponas por respondi al la kontraŭleĝa konduto de Usono? Ni mallonge pritraktu la problemojn tiurilate ne por pesimismi, sed ĉar estas necese rigardi la situacion el realisma vidpunkto.

Ĉar Usono estas konstanta membro de la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj, tiu organo de la organizaĵo efektive ne kapablas fari devigajn decidojn kontraŭ ĝi. Aŭ la Sekureca Konsilio aŭ la Ĝenerala Asambleo povas esprimi sian opinion—tio estas, nedevigan rekomendon, ke Usono ĉesu sian kontraŭleĝan konduton en la Kariba Maro—se sufiĉe da ŝtatoj interesiĝas pri la afero por fari tian rekomendon. Atentigo al Usono pri la kontraŭleĝeco de ĝiaj agoj estas pli bona ol nenio, kaj eble utilos al estontaj registaranoj aŭ eĉ eventualaj procesoj en naciaj kortumoj.



Konsilio de Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj

Venezuelo, se ĝin interesas la rajtoj de ĝiaj civitanoj, povas submeti la aferon al la Internacia Kortumo, tamen Usono retirigis de deviga jurisdikcio de tiu tribunalo en 1986 post malfavora decido en *Nicaragua v. United States*. Ĝi verŝajne ne libervole akceptos jurisdikcion pri malpaco kun Venezuelo. Ankaŭ povas esti kialoj pro kiuj Venezuelo ne volus, ke la Internacia Kortumo prijuĝu la aferon: se tiuj boatoj vere ne transportis drogojn, sed migrantojn, kiuj fuĝis de teruraj deliktoj kontraŭ homaj rajtoj en Venezuelo mem, tiu ŝtato verŝajne ne volos, ke la afero estu tro esplorita. Cetere, ajna decido estus samkiel rekomendo de la Ĝenerala Asambleo aŭ Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj: Senpova, ĉar necesus akordiĝon de la Sekureca Konsilio—inkluzive de Usono kiel konstanta membro—por devigi plenumon de la decido. Usono sendube uzus sian vetoon kontraŭ eventuala malfavora decido.

La Internacia Puna Kortumo povas decidi pri homoj (sed ne ŝtatoj) akuzitaj de kelkaj krimoj, inkluzive de agreso kaj krimoj kontraŭ la homeco (kvankam estas malprobable, ke 14 murdoj atingas la necesan grandskaloon por esti taksata kiel krimo kontraŭ la homaro). Tamen ĝia jurisdikcio estas limigata al tri kazoj: 1) krimoj sur teritorio de ŝtato-partio de la Statuto de Romo; 2) krimoj faritaj de ŝtatano de ŝtato-partio; kaj 3) krimoj plusenditaj al ĝia prokuroro de la Sekureca Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj. Laŭaspekte, la agoj estis faritaj en internacia maro, kaj Usono ne estas ŝtato-membro de la Statuto de Romo. Kompreneble la Sekureca Konsilio ne plusendos la aferon pro la suprecititaj limoj pri ĝia efikeco.

Do forta respondo al la kontraŭleĝaj agoj kadre de la organoj de Unuiĝintaj Nacioj aŭ de la Internacia Kriminala Kortumo ne estas probabla. Eksterjustica mortigo kaj agreso ankaŭ estas aferoj de *jus cogens*, tio estas, juro deviga al ĉiuj ŝtatoj kaj sen esceptoj eĉ en cirkonstancoj de grava neceso. Al tiaj normoj aplikeblas universala jurisdikcio, do kiu ajn lando rajtas procesi kontraŭ la respondeculoj. Verŝajne tiuj respondeculoj evitos nediplomatiajn vizitojn al landoj, kiuj estigus tiajn procesojn kontraŭ ili.



Sidejo de la Internacia Puna Kortumo en Hago (Nederlando)

Ĉu do internacia juro estas senpova kontraŭ granda ŝtato? Ĉu eblas instigi la usonan registaron plenumi siajn devojn laŭ internacia juro, aŭ ĉu la potenco de Usono liberigas ĝin de tiaj devoj? Nu, manke de devigaj rimedoj, restas nur diplomatiaj kaj konvinkaj rimedoj. Tio eble ne tute kontentigas, sed ĝi spegulas la realan situacion pri internacia juro kaj potencaj ŝtatoj. Komentoj


de Ivo Lapenna antaŭ preskaŭ 75 jaroj, kiam li parolis pri la “principo de unuanimeco” de la Sekureca Konsilio—t.e., la rajto vetoi de ĉiu ajn el la konstantaj membroj—aplikeblas ankaŭ pli ĝenerale por nia aktuala situacio: “Finfine, per jura regulo oni ne povas ŝanĝi la faktajn rilatojn de la fortoj en la mondo. Objektive, reale, efektive tiuj fortoj ekzistas kaj ili estas ĝuste tiaj, kiaj ili estas...Tial, laŭ nia opinio, la vera problemo ne estas ĉu kaj kiel ŝanĝi tiun principon [t.e., ebligi la Sekurecan Konsilion fari devigajn decidojn kontraŭ konstanta membro], sed multe pli kiel atingi, ke la grandaj potencoj trovu fine komunan lingvon por savi sin mem kaj la tutan mondon de la pereco.”



Konsilio de Sekureco de Unuiĝintaj Nacioj

Restas al ni la laboro helpi ilin trovi tiun komunan lingvon. Se ne pli ni povas fari, ni havas almenaŭ la devon skribi, registri ĉi tiujn kaj aliajn deliktojn kontraŭ homaj rajtoj, kie ajn ili okazas kaj nekonidere de kiu faras ilin. Tio eble helpas al eventualaj estontaj reformantoj de niaj internaciaj institucioj vidi kaj ripari la nunajn mankojn. Espereble tio okazos antaŭ ol alia mondmilito perforte atentigos la bezonon al la homaro, eĉ se la historio ne lasas nin tre optimismaj pri tio.





Jura Fakultato de la Universitato de Graz (Aŭstrio)



Artefaritaj insuloj kaj Internacia Mar-juro

José María Rodríguez (Hispanio)

La sciencaj kaj teknologiaj progresoj vivitaj dum la lastaj jardekoj ebligis grandan antaŭeniron de la civila inĝenierado. Krom aliaj aferoj, homo ebligis la konstruon de insuloj, kiuj ne formiĝis pro naturaj procezoj, male ili estis konstruitaj sur terenoj antaŭe kovritaj de la maro. Same, estis eble starigi artefaritajn instalaĵojn, similajn al petrolaj labor-platformoj. Tamen, ĉi tiu afero ne okazas nur de post nunaj jaroj, tiel en Irlando kaj en Skotlando estas eble trovi *crannóg*, tio estas artefaritaj insuloj faritaj el trunkoj, sablo kaj ŝtonoj. Ili estis konstruitaj jam dum la neolitiko kaj sur ili oni starigis domojn kaj foje eĉ defend-murojn. Ankaŭ sur la lago Titikako, inter Bolivio kaj Peruo, inkaoj konstruis flosantajn insulojn. Same, la urbo Tenoĉitlano estis konstruita de la azteka civilizacio sur natura insulo, poste ĉirkaŭigita de sennombraj artefaritaj insuloj.



Laŭidea bildo de la azteka urbo Tenoĉitlano (Meksikio)

La konstruado de ĉi tiuj insuloj, ĉefe se ili troviĝas je centoj da kilometroj de la kontinenta teritorio, garantias la tiean ĉeeston de ŝtato, krom la evidentan militan povon projekciitan sur tiun zonon. Tamen, ĉi tiuj lokoj ankaŭ povas esti

kaŭzo de regiona ne-stabileco kaj eĉ de baldaŭa konflikto. Tio okazas rilate la insulojn konstruitajn sude de la Ĉina Maro. Sur tiu zono ekzistas dekoj da malgrandaj insuletoj, ofte nur sablobenkojn, pri kies suvereneco disputas apudaj ŝtatoj kiel Ĉinio, Vjetnamo, Filipinoj, Brunejo aŭ Malajzio. Sub la preteksto monitori la mar-nivelon, Ĉinio konstruis platformojn sur lokoj kiuj reale estis sablobenkoj, ofte tute kovritaj de mar-akvo. Tamen, per dragado kaj posta ter-ŝtopado tiuj sablejoj fariĝis insuletoj, sur kiuj oni starigis milit-instalaĵojn. Tio ebligis al Ĉinio kontroli la apudajn akvojn kaj aer-zonon el la strategia vidpunkto.



Ĉina milit-bazo konstruita sur rifo de Spratli-insularo

Sed risko pri konflikto daŭre ekzistas. Ni ne forgesu incidenton en la Spratli-insularo, kiam en la jaro 1988 Ĉinio atakis kaj sinkigis du vjetnamajn ŝipojn kiuj troviĝis tie por efektivigi vjetnaman suverenecon sur kelkaj el tiuj insuloj. Tiam kombato provokis 64 vjetnamajn soldatojn mortintajn.

Do, unuavide artefaritaj insuloj havigas efikan projekcion sur apudaj akvoj al al konstruita ŝtato. Tamen aperas demando, ĉu ĉi tiuj instalaĵoj ankaŭ havigas iaspecan suverenecon rajton sur ĉirkaŭantaj maraj zonoj kiel la naturaj insuloj? Ni pristudu la aferon laŭ diversaj ekzistantaj situacioj.

TUTE ARTEFARITAJ INSULOJ

La artikolo 121.2 de la Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Marjuro proklamas, ke insuloj ĝuas saman suverenecon rajtojn rilate ĉirkaŭantajn marajn zonojn ol la kontinentaj teritorioj. Tamen, ni devas atenti unue al la unua

paragrafo de tiu sama artikolo, kie aperas difino pri kio estas insulo. Laŭ artikolo 121.1 de la Konvencio insulo estas natura etendaĵo de tero ĉirkaŭigita de akvo, kiu troviĝas sur la maro dum alta tajdo. Do, "artefarita insulo" ĉar ne natura etendaĵo de tero, ne ĝuas ajnan suverenecan rajton sur apudaj akvoj.



Insulo Northstar, artefarita insuleto en Alasko (Usono), kie oni elfosas gason kaj petrolon.

Interesa demando pri artefaritaj insuloj estas, ĉu ŝtato rajtas konstrui artefaritajn insulojn. Por respondi jenan demandon ni denove devas tralegi la Konvencion pri Marjuro de la jaro 1982, ekvalida de post 1994. Tiel, la artikolo 60.1.a) disponas, ke:

Artikolo. 60

Artefaritaj insuloj, instalaĵoj kaj aliaj strukturoj en la ekskluziva ekonomia zono.

1. En la ekskluziva ekonomia zono, nur la mar-borda ŝtato rajtas, konstrui, ankaŭ rajtigi, reglamenti pri la konstruado, utiligado kaj agado de:

a) artefaritaj insuloj

Ĉi tiu libereco konstrui instalaĵojn en la maro estas preskaŭ kompleta, sur la normaro ankaŭ aperas kelkaj mencioj pri la neceso respekti la ekologian diversecon de la maraj fundoj de la zono kie la insulo estos starigita, same, ĝi ne devas ĝeni la liberan trapasadon de ŝipoj. Cele al ĉi tio, situo de la artefarita insulo devas esti anoncita per konvenaj signaloj almenaŭ 500 metroj ĉirkaŭe.

Analogie, ĉi tiu libereco ankaŭ povas esti aplikata al la kontinentbreto.

20 La artikolo 80-a de la Konvencio eĉ uzas la esprimon *mutatis muntadis* (oni

plene ripetas tekston), por sciigi, ke la rajto starigi artefaritajn insulojn ĉe la ekskluziva ekonomia zono ekzistas same rilate la kontinentbreton. Tamen, kiel dirite kaj ripetite sur la artikolo 60.8. la artefaritaj insuloj ne estas konsideritaj vere kiel insuloj, do ili ne havas teritorian maron, ili ankaŭ ne povas esti kakulitaj por difini la ekskluzivan ekonomian zonon aŭ la kontinentbreton.



Artefarita insulo ne plilongigas la ekonomian ekskluzivan zonon de la mar-borda ŝtato.

SABLOBENKOJ TER-ŜTOPITAJ


Ekzistas tra maroj kaj oceanoj sablobenroj kiuj ofte estas kovritaj de maro dum alta tajdo. Por scii ĉu ili estas insuloj aŭ ne, ni memoru la difinon de insulo proklamita de la Konvencio pri Mar-juro sur la artikolo 121.1, laŭ kiu insulo estas natura etendaĵo de tero ĉirkaŭigita de akvo, kiu troviĝas sur la maro *dum la alta tajdo*. Do, insulo, se tiel konsiderata, devas troviĝi sur la mar-akvo ĉiumomente.

Tamen, lastatempe kaj ĉefe ĉe la Ĉina Maro, amasa ter-ŝtopado de simplaj sablobenroj ebligas la aperon de sufiĉe granda insulo. Temas do, pri la starigo de iaspeca artefarita insulo sur natura sablobenro jam ekzistanta. Aliaj eblecoj estas pligrandigi naturajn insuletojn, simplajn rokojn, unuigi insuletojn pere de artefaritaj strukturoj aŭ ŝtopado de atolaj lagoj. La laboroj komenciĝis en la jaro 2013 kiam Ĉinio ekŝtopis sep koral-rifojn ĉe la insularoj Spratlio kaj Paracelo. Nur du jarojn poste, tiuj rifoj jam fariĝis solida tereno kie estis eble konstrui havenojn, flughavenojn, hangarojn kaj aliajn militajn instalaĵojn. Fine de la jaro 2015 proksimume 12 km² estis tute konstruitaj.

Do eblas demando, ĉu ĉi tiuj strukturoj konstruitaj sur naturaj sablobenroj aŭ sur ne-stabilaj rifoj konvertas tiun zonon en veran insulon? Nu,

se temas pri akvo-kovrado, estas necese agnoski, ke ĉi tiuj novaj zonoj, post homa interveno, jam troviĝas konstante sur la maro, eĉ dum la alta tajdo.

En la jaro 2013, tuj post la okupo fare de la ĉina mar-armeo de kelkaj sablobenroj en la zono Scarborough, ĉe la Ĉina Maro kaj je 225 kilometroj de la filipina marbordo, Filipinoj plendis antaŭ la Internacia Kortumo en Hago. Filipinoj argumentis, ke tiu agado, kaj la posta konstruo de milit-bazo sur unu el la sablobenroj, damaĝis la laboron de tieaj tradiciaj fiŝkaptistoj, endanĝerigis la navigadon kaj damnis la ekologian riĉecon de mar-fundoj.



Antaŭ kaj post konstruo de ĉina milit-bazo en Spratli-insularo



En la jaro 2016 la Internacia Kortumo deklaris, ke sablobenro ekzistanta nur dum la basa tajdo aŭ roko kiu ne povas esti konsiderata kiel insulo, pro la fakto ke tie ne eblas la disvolviĝo de aŭtonoma homa vivo¹, ne povas fariĝi insulo pro la homa agado. Tiel, statuso de mara formacio nur povas esti ekzamenata el sia natura pozicio, ne pro la posta interveno de homoj.

1. La artikolo 121.3 de la Konvencio pri Mar-juro disponas, ke insuloj kie homa vivo ne povas disvolviĝi aŭ kie ne ekzistas propra ekonomia vivo havas nek ekonomian ekskluzivan zonan nek kontinentbreton.

Aldonis la Internacia Kortumo, ke se oni admisius, ke ŝtato povas starigi artefaritajn instalaĵojn sur kiu ajn maran zonon aŭ sur simpla roko ĉe la maro, tio kuraĝigus al tiu ŝtato plilongigi artefarite sian suverenecon sur maraj zonoj, damaĝante rajtojn de aliaj apudaj ŝtatoj kaj eĉ la propran maron, kiu estas komuna havaĵo de la Homaro. La unua ĉina reago al tiu juĝo estis deklari la mankon de jurisdikcio de la Kortumo pri ĉi tiu afero.

Do, laŭ la Internacia Kortumo, tiuj maraj zonoj kiuj nur estas videblaj dum la basa tajdo, aŭ rokoj kie ne estas eble disvolviĝi aŭtonoman homan vivon, ne povas atingi la kategorion de insulo, eĉ se homoj starigas sufiĉe grandajn instalaĵojn sur ĝi. Sekve, se tiuj zonoj ne povas esti konsiderataj kiel insuloj, ili ĝuas nenian suverenecan rajton sur apudaj maroj.

ARTEFARITAJ INSTALAĴOJ ALDONITAJ AL NATURAJ INSULOJ

La evoluo de klimat-ŝanĝo en nia planedo kreis situaciojn malfacile imageblaj en la jaro 1982, kiam oni aprobis en Montego Bay (Jamajko) la Konvencion pri Mar-juro. Unu el tiuj teruraj konsekvencoj estas la malapero de insuloj aŭ de marbordaj zonoj pro marnivela leviĝo, kaŭzita de la varmigo de oceanaj akvoj kaj de la pliiĝanta fandado de terbazita glacio.

Nuntempaj ŝtatoj formitaj de ununura insulo, kiel Nauruo, aŭ de insularo, kiel Maldivoj, kies averaĝa alteco estas 1,5 metrojn sur marnivelo, povas malaperi kovritaj de oceanoj se la marnivela leviĝo daŭriĝas. Ĉi-kaze ankaŭ inĝenierado povas esti tre efika por eviti terurajn konsekvencojn en ĉi tiuj insuloj, do, ofte oni starigas artefaritajn instalaĵojn ĉirkaŭ aŭ apud la insulo por garantii la ekziston de la lando mem.

Unu el la plej okulfrapaj ekzemploj de tiuj artefaritaj instalaĵoj aldonitaj al zonoj jam konsideritaj kiel insuloj, videblas en la insulo Hulhumale, artefarita zono konstruita tuj apud Male, ĉefurbo de la Maldiva Insularo. Temas preskaŭ pri fortreso starigita 500 metrojn antaŭ natura insulo por eviti la iom-post-ioman malsupreniĝon de Male. Kvankam verdire linio inter artefarita instalaĵo por eviti sinkigon kaj simpla ampleksigo de teritorio estas vere fajna, tiel sur tiu artefarita insulo oni konstruis novajn kvartalojn kaj eĉ internacian flughavenon. Tamen, estas necese agnoski ke artefaritaj instalaĵoj konstruitaj apud jam ekzistanta insulo, kaj tiel konsiderata pro la fakto, ke sur ĝi disvolviĝas homa vivo, daŭre havas kompletajn suverenecajn rajtojn sur ties ekonomia ekskluziva zono kaj same sur la kontinentbreto.



Insulo Hulhumale (Maldiva Insularo)

Alie, tiuj instalaĵoj garantias la ekziston mem de ŝtato, aŭ de parto de tiu ŝtato, tiu daŭra ekzistado estas la bazo por la efektivigo de ĝiaj suverenecaj rajtoj.

Konklude, la Konvencio pri Mar-juro garantias la rajton de la ŝtatoj starigi artefaritajn instalaĵojn sur ilia ekonomia ekskluziva zono, kaj ankaŭ sur la kontinentbreto. Tamen, tiu rajto ne povas esti komprenata kiel plilongigo de la suverenecaj rajtoj sur maraj zonoj, ankaŭ ne kiel pravigo por ebla teritoria, ĉi-kaze mara, suvereneca pripostulo.

Kunlaboru kun **JURA TRIBUNO INTERNACIA**

Se vi emas verki en esperanto pri juraj temoj ni plezure aperigos viajn kontribuaĵojn en niaj paĝoj.

Artikoloj: inter 4 kaj 10 foliojn A4 (unuflanka duobl-spaca).

Recenzoj: vi povas paroli pri legita libro. La verko elektota devas temi pri jura afero, kvankam ne necese pri/en esperanto.

Informoj: vi povas informi pere de ĉi tiuj paĝoj pri juĝoj, novaj leĝoj, internaciaj aferoj, traktatoj ktp. Same, pri kelka afero rilata al Juro en via lando aŭ komunumo. La informoj devas ampleksi inter 1 kaj 3 foliojn.

Adresoj de la redakcio: Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)



Pun-tribunalo en Graz (Aŭstrio)



Kelkaj pripensoj pri Juro kaj la arto rakonti.

Rencezo pri “La Rakontanto” de Walter Benjamin.

Nelson di Blanco (Argentino)

Walter Benjamin (Germanio, 1892 – Hispanio, 1940), en “La Rakontanto” (1936), meditas pri la perdo de la kapablo rakonti historiojn en la moderna mondo. Tiu verko ne nur esploras la kaŭzojn de tiu fenomeno, sed ankaŭ ligas la rakontadon al metia praktiko, en kiu sperto kaj memoro estas la ĉefaj aksoj. Tiu pripensoj ne estas nur literatura, sed ĝi profunde kunligiĝas kun ideoj evoluigitaj de Jerome Bruner aŭ Sigmund Freud kaj indas por dialogado inter Juro kaj Literaturo. La nuna artikolo analizas tiun eseon laŭ la menciitaj perspektivoj, esplorante la rilatojn inter rakonto, socio kaj justeco.



Walter Benjamin 1892 ~ 1940

La nuntempa “krepusko” aŭ malfortiĝo de la rakontado.

Benjamin atentigis, ke en la moderna mondo la arto rakonti iom post iom malfortiĝis. Laŭ li, la homa sperto fariĝis fragmenta kaj ofte sen profunda senco, precipe pro fenomenoj kiel milito kaj rapida teknologia evoluo. Li asertis ke la transonado de historioj ĉiam baziĝis sur komune travivitaj spertoj; tamen en epoko, kiu preferas rapidan “informon”, tiu tradicio ŝajnas malaktuala. La tradicia rakontanto, kiu iam havis aŭtoritaton pro sia propra travivita sperto, estis anstataŭigita de la “moderna leganto”, kiu serĉas konkretajn faktojn, datumojn kaj tujajn respondojn, ofte sen intereso pri pli vasta kunteksto aŭ homa profundo.

Simile, Jerome Bruner (Usono, 1915 - 2016), en “La fabriko de rakontoj” (2003), aldonis alian vidpunkton. Li konsideras rakontadon kvazaŭ “kultura gluo”, kiu organizas la sperton kaj la socian koherecon. Laŭ Bruner,

historioj ne nur spegulas aŭ priskribas la realecon, sed ankaŭ ĝin formas. Tio ebligas al homoj loki sin mem ene de komuna signifokadro.

Jen aperas paradokso: dum Benjamin bedaŭras la erozion de la tradicia rakontanto, Bruner emfazas, ke eĉ en sia moderna malkreskiĝo, la rakontado restas necesa por konstrui komunan sencon. Tio sugestas, ke kvankam la manieroj ŝanĝiĝis, la homa impulso rakonti kaj kundividi historiojn ĉiam estos bazo de nia kultura identeco.



Rakontado, mito kaj kolektiva nekonscio.

Benjamin ankaŭ starigis ligan inter la rakontanto kaj la komunumoj, kiuj subtenas buŝajn tradiciojn; tiamaniere la rakontado funkcias kiel kolektiva memoro, kunligante la vivantajn kun la mortintoj. Tiu aspekto similas al tio, kion Sigmund Freud (Aŭstrio, 1856 – Anglio, 1939) esploris en “Totemo kaj tabuo” (1913): konstruado de sociaj normoj surbaze de mitaj rakontoj. Freud argumentis, ke mitoj, same al ĉiaj rakontitaj historioj, funkcias kiel rimedoj por turni kolektivajn spertojn de kulpo, timo kaj deziro en simbolajn strukturojn, kiuj direktas la sociajn travivaĵojn.

El tiu vidpunkto, la rakontado ne nur informas aŭ transdonas sperton, sed ankaŭ sublimigas la homajn tensiojn, kaj formigas historiojn kun trankviliga kaj strukturiga efiko. Tial, la perdo de la arto rakonti reprezentas kulturen ŝanĝon, kiu povus konduki al malfortiĝo de la homa kapablo transformi traŭmatajn spertojn en komune kundividitajn rakontojn. Tiu rakonta funkcio, kiel atentigas Freud, estas fundamenta por konservi la simblan teksaĵon, kiu subtenas la komunumon kaj nutras la kulturon; sen tiu “arto”, la moderna socio alfrontas gravan riskon de fragmentiĝo kaj fremdiĝo.

La rakontado kiel metia praktiko kaj ĝia rilato kun Juro.

Benjamin komparis la rakontanton kun metiisto, tio estas, iu kiu pacience prilaboras la krudan materialon (la sperton) por krei solidajn kaj signifoplenajn historiojn. Tiu metia procezo paralelas kun Juro kaj juraj proceduroj: tiusence, oni povas kompreni Juron kiel agadon, kiu ne nur starigas normojn, sed ankaŭ rakontas kaj reordigas sociajn rakontojn. Juĝaj verdiktoj, ekzemple, estas rakontaj konstruoj, kiuj (celante solvon) donas sencon al homaj konfliktoj, kadre de komuna kunteksto jura kaj morala.

La interrilato inter Juro kaj Literaturo kuŝas ĝuste sur tiu rakonta kapablo. Same kiel la rakontanto ĉe Benjamin, juĝistoj aŭ juristoj transformas kompleksajn homajn spertojn en rakontojn interne koherajn. Tamen, dum la tradicia rakontanto celas konservi memoron kaj sperton, Juro uzas tiujn rimedojn por ordigi la nunon kaj disponigi efikajn normojn, kiuj ebligas desegni kaj daŭrigi la estontecon. En tiu senco, la verko de Benjamin povas esti legata kiel averto: la malhomigo de rakontoj minacas kaj la literaturon kaj la Juron, ĉar ambaŭ fakoj dependas de la kapablo konstrui historiojn, kiuj estigas sencon.



Bruner ankaŭ helpas kompreni tiun rilaton. Laŭ li, rakontoj ne estas nur maniero organizi la sperton, sed ankaŭ maniero intertrakti potencon kaj aŭtoritaton ene de komunumo. Tio klare montriĝas en la jura kampo: historioj rakontataj en tribunaloj ne estas neŭtralaj, sed ofte spegulas kaj firmigas potencostrukturojn. En tiu kunteksto, la rakontanto (kaj la juristo) kiel metiisto, memorigas nin pri la graveco de zorge prilaboritaj historioj, ne nur laŭ estetika sed ankaŭ laŭ justeca vidpunkto.

Etika dimensio de la rakontanto.

Unu el la plej fortaj ideoj en “La Rakontanto” estas la aserto, ke “la rakontanto estas figuro, en kiu la justulo renkontas sin mem”. Laŭ Benjamin, la rakontanto ne estas nur peranto de historioj, sed iu, kiu enkorpiĝas etikon: li aŭskultas, prilaboras kaj kundividigas la homan sperton por riĉigi la komunumon. Same juristoj nepre devas kunligi justecon, empatian kaj saĝecon.

La rakontanta etiko havas ankaŭ politikajn implicojn. La rakontado, kiel atentigas Benjamin, estas formo de rezisto kontraŭ la nuntempa malpersonigado. Pere de rakontataj historioj, la homoj klare firmigas la valoron de individua kaj kolektiva sperto male al abstrakteco de teknologiaj kaj burokrataj sistemoj. Resume, kaj la rakontanto kaj la juristo kunhavas komunan mision: konservi la homecon en mondo, kiu emas senigi al homoj iliajn proprajn historiojn.

Konkludo: urĝas rakonti.

“La Rakontanto” de Walter Benjamin ne estas nur pripensio pri literaturo, sed alvoko re-pripensi la rolon de historioj en niaj vivoj. Per sia analizo, Benjamin montras, kiel kaj kial la perdo de la arto rakonti minacas la homan kapablon doni senco al homa sperto, konstrui komunumojn kaj rezisti fremdiĝon. Tiuj ideoj ankaŭ estis zorgitaj de Jerome Bruner, kiu taksis rakontadon esenca rimedo por organizi la socian kunvivadon, kaj de Freud, kiu rekonis en la rakonto manieron sublimigi homajn tensiojn.

Interrilatinte Juro kaj Literaturo, “La Rakontanto” memorigas nin, ke kaj rakontantoj kaj juristoj portas etikan respondecon: restigi viva la kapablon rakonti historiojn, ĉar tio donas senco, justecon kaj koherecon al niaj vivoj. La tasko de la rakontanto (kaj de la juristo), same kiel tiu de la justulo, estas ne ĉesigi bruli la flamon de la historioj. En mondo, kiu preferas ekinformon ol saĝo, rapidecon ol prilaborado, la rakontado firme restas ago de rezisto kaj espero.





Urbodomo de Graz (Aŭstrio)



AFRIKO

GANAO PETAS INTERNACIAN ARBITRACION POR SOLVI DISPUTON KUN TOGO



Registaro de la Ganaa Respubliko ĵus sciigis al tiu de Togo sian pretecon serĉi internacian arbitracion por pricideci la maran limon inter ambaŭ ŝtatoj, pro la fakto, ke post ok jaroj da intertraktadoj oni atingis nenium definitivan akordon. Tiuj unuaj konversacioj komenciĝis en la jaro 2018, pro peto de la



registro de Togo, kiu konsideris ke nuntempa mara limo inter ambaŭ ŝtatoj estas postrestaĵo de la kolonia epoko. En la jaro 2021 Togo rifuzis proponon de Ganao fiksi provizore tiun maran limon, ĉar Ganao jam ekspluatis tiun disputitan zonan.

Per oficiala komuniko Ganao informis, ke pere de tiu internacia arbitracio oni evitus eblajn incidentojn aŭ streĉitecon inter ambaŭ landoj.

La registaro de Togo ankoraŭ ne respondis oficiale al tiu ganaa propono. Verdire, mara limo inter Ganao kaj Togo neniam estis oficiale adoptita kaj agnoskita de ambaŭ ŝtatoj, do, Ganao asertas, ke ekzistas limo tradicie respektata, tamen Togo serĉas oficialan difinon de tiu linio. La disputita marzono en la Gvineo Golfo havas riĉajn hidrokarbonajn resursojn, do, kvankam rilatoj inter ambaŭ landoj estas sufiĉe bonaj, internaj debatoj malfaciligas la atingon de definitiva kompromiso.

KOREA EKSPREZIDENTO KONDAMNITA JE DUMVIVA ENKARCERIGO



Sud-korea kortumo ĵus kondamnis eksprezidenton Jun Sok-jol je dumviva enkarcerigo, kiel promulganton de efemera milit-leĝo, kiu provokis politikan kaj socian ĥaoson kaj minacis demokratian politikan sistemon en Sud-Koreio.

La 3-an de decembro 2024, prezidento Jun aperis televide je malfruaj noktaj horoj, por informi, ke *kontraŭ-ŝtataj fortoj favoraj al*

nord-korea reĝimo regis la opoziciantajn politikajn partiojn de Sud-Koreio.

Sub liaj ordonoj, armitaj soldatoj descendis el helikopteroj en la parlamentan sidejon, tiumomente troviĝis tie parlamentanoj. Centoj da civitanoj furioze blokis la pordojn de la parlamento, por malebligi la asalton de militistoj. Ĉi tiuj ĥaosaj scenoj estis rekte dissenditaj de televido. Parlamentanoj voĉdonis kontraŭ la leĝo promulgita de la prezidanto, kiu kelkajn horojn poste nuligis sian unuan decidon.

La 14-an de decembro 2024, la parlamento decidis ekigi politikan proceson kontraŭ li, kelkajn tagojn poste li eĉ estis arestita. En aprilo 2025 la Konstitucia Kortumo ratifis la proceson, kiu finiĝis per lia elpostenigo. Juĝa proceso komenciĝis tiam. La juĝanta tribunalo ĵus proklamis, ke la deziro de la Prezidento Jun, kiam li promulgis milit-leĝon, estis likvidi la nacian parlamenton kaj aresti ĉiujn politikajn kontraŭulojn.

Fine, tribunalo kondamnis lin je dumviva enkarcerigo, pro lia partoprenado en laboroj por likvidi la nacian parlamenton kaj la demokratian sistemon en Sud-Koreio.




En Nov-Zelando estas promulgita leĝo per kiu Monto Taranaki, en la maoria lingvo *Taranaki Maunga*, iĝis posedanto de respondecoj, devoj, rajtoj kaj povoj similaj al tiuj de homoj. Monto Taranaki estas la dua plej alta vulkano en la norda insulo de Nov-Zelando. Ĉi tiu nova leĝo celas ripari maljustaĵojn kontraŭ la maoriaj popoloj dum la koloniigo de la insularo en la 19-a jarcento. Tiel, depost nun la kolonia nomo Monto Egmont estus forgesita favore al la indiĝena originala nomo *Taranaki Maunga*.



La nova leĝo agnoskas, ke la monto estis rabita al maorioj post la koloniigo de Nov-Zelando. Laŭ ili, ĉi tiu monto ne estas nur amaso de roko kaj tero, male ĝi estas simila al praularo, kun propraj identeco kaj spirito, kies celo estas kunligi la generaciojn de la regiono. Do, ekde nun *Taranaki Maunga*, kun siaj pintoj kaj ĉirkaŭantaj terenoj, ĝuas similajn rajtojn kaj devojn ol homo. En Nov-Zelando temas pri la tria natura elemento al kiu oni havigis ĉi tiun leĝan karakteron, post la montaro Te Urewera en la jaro 2014 kaj la rivero Whanganui en 2017.

Ĉi tiu oficiala agnosko estas nova paŝo celanta repacigon kun la maoria popolo. Dum la 19-a jarcento, brita kolonianta reĝimo konfiskis pli ol unu milionon da hektaroj, deslokigante la maorian popolon. Ĉi tiu nova leĝo venas post akordo subskribita en la jaro 2016 de la nov-zelanda registaro kaj reprezentantoj de la maoria popolo, oni inkluzivas oficialan pardonpeton kaj financon kompenson.



Usona Supera Kortumo juĝis, ke Prezidento Donald Trump ne agis akorde al federala leĝo kiam li difinis propra-flanke novajn dogan-tarifojn al aliaj ŝtatoj. Temas, do, pri la plej grava juĝa malvenko de la Trump-registaro, post favoraj juĝoj de la Kortumo rilate liajn decidojn pri enmigrado, maldungoj kaj reduktado de publikaj elspezoj.

La Supera Kortumo juĝis, 6 poraj voĉdonoj kontraŭ 3, ke la dogan-tarifoj estas kontraŭ-leĝaj. Tamen, oni diris nenion pri ebla neceso redoni pli ol 134 milionojn da dolaroj jam enspezitaj dank'al tiuj tarifoj.

La juĝo sciigas, ke Prezidento Trump arogis al si la eksteordinaran povon fiksi tarifojn, decidante li mem pri mon-kvanto kaj daŭro de ĉi tiu nova imposto. Tamen, laŭ la juĝo, ĉi tiu rajto apartenas nur al Kongreso. Post koni la juĝon, Donald Trump diris, ke temas pri hontiga juĝo, tuj poste li foriris el salono kie li rendevuis kun ŝtat-guberniestro.

Ĝis la mezo de decembro 2025, Usono atingis 134 milionojn da dolaroj, verŝajne, ebla redono de tiuj pagoj devos esti solvitaj de pli subaj tribunaloj. Prezidento Trump fiksas tiujn dogan-tarifojn akorde al leĝo promulgita en la jaro 1970. Tiu normo havigis al prezidento la rajton reguligi importadon de eksterlandaj produktoj dum kriz-okazoj. Laŭ la usona administracio, tiu rajto ankaŭ inkludas la eblon fiksi tarifojn al tiuj eksterlandaj produktoj. Tamen la kortumo deklaris en sia juĝo, ke la termino "dogan-tarifo" ne aperas sur tiu leĝo de la jaro 1970. Alie, tiu rajto ja aperas ene de aliaj leĝoj, ekzemple leĝo pri komerco de la jaro 1974, kies artikolo 122-a permesas fiksi dogan-tarifojn ĝis la 15% de la prezo de la varo, sed kun 150-taga limigo.



Brazila tribunalo ĵus absolvis 35-jaraĝan viron, akuzita seksperforti 12-jaraĝan junulinon, kun la argumento ke *ambaŭ estas ege enamigitaj kaj unuigitaj pere de interkonsentita ligilo*. Brazila Pun-kodo disponas, ke kiu ajn seks-rilato kun ne-plenaĝulo sub 14 jar-aĝa estas kontraŭ-leĝa, tamen laŭ kalkuloj pli ol 30.000 junulinoj, ankoraŭ ne 14-jaraĝaj, deklaris, ke ili iamaniere edziniĝis, malgraŭ la fakto, ke geedzo ne estas permesita ĝis 16-a vivo-jaro. Alia, datumo sciigas, ke ĉiutage naskiĝas 38 beboj kies patrinoj ankoraŭ ne estas 14-jaraĝaj.



Jena prijuĝata afero okazis en malgranda urbo en la ŝtato Minas Ĝerajso, kiam knabino lasis ĉeesti la lernejon. Baldaŭ, aŭtoritatuloj eltrovis, ke ŝi loĝis ĉe viro kiu triobligis ŝian aĝon. Brazila leĝo disponas, ke neniu junulo antaŭ sia 14-vivojaro kapablas konsenti pri seksa rilato, do oni decidis sciigi pri ĉi tiu kazo al prokuroro. Unua-instance la viro estis kondamnita je 9-jara enkarcerigo, junulino kaj ŝia patrino estis absolutitaj. Tamen, kondamnito apelaciis kaj nun supera tribunalo absolvis ankaŭ lin, pro la fakto, ke temas pri interkonsentita rilato.

Ĉi tiu juĝo ricevis akrajn kritikojn de ĉiuj politikaj partioj en Brazilo, eĉ la Nacia Konsilio pri Justico petis klarigojn al tribunalo pri tiu ĵusa juĝo. Laŭ fakuloj, kvankam ĉi tiaj situacioj estas akceptataj ĉe kelkaj sociaj sektoroj, estas necese ŝanĝi mensojn de homoj, kaj ne nur promulgi novajn leĝojn.



La Granda Ĉambro de la Eŭropunia Kortumo ĵus deklaris, ke naciaj juĝistoj povas kontroli arbitraciajn decidojn de sportaj tribunaloj, se temas pri sporto kun ekonomia signifo en la teritorio de Eŭropa Unio. Se male, tiu ekonomia agado ne ĝuus efektivaĵajn juĝajn garantiojn.

Nuntempe, internaciaj sportaj kunfederacioj, ekzemple la futbala FIFA, submetas eblajn disputojn inter federacioj aŭ inter sportaj kluboj al decido farita de ekstera arbitracia tribunalo. Tiel, la Internacia Kortumo de Arbitracio por Sporto, kun sidejo en Laŭzano (Svisio), kiel kvazaŭ-juĝa instanco, pristudas disputojn koncerne sportojn.

Ĉiuj sportaj internaciaj federacioj devigas siajn federaciitajn klubojn akcepti tiun nepran arbitraciadon. Tamen nun, la Eŭropunia Kortumo konsideras, ke tiu juĝa aŭtonomeco ne povas limigi la eblecojn de privatuloj aŭ eĉ de sportaj kluboj por efektiviĝi siajn rajtojn antaŭ nacia juĝisto.



Do, kvankam oni daŭre akceptas la nepran arbitracion inter federaciitaj kluboj, se tio estas antaŭe interkonsentita, ili povos prezenti la aferon antaŭ nacia juĝejo, kiu devos kontroli ĉu la arbitracia decido estas konforma al normaro de Eŭropa Unio. La juĝo same disponas, ke la nacia juĝisto ankaŭ povos fiksi la necesajn antaŭ-juĝajn rimedojn por certigi la kompletan efikecon de ebla onta juĝo. Ĉi ĉio validas por kiu ajn sporta agado kun ekonomia signifo, ekzemple futbalo, basketbalo kaj aliaj.

La afero pristudita en tiu juĝo temis pri malkonsento inter futbal-klubo de Belgio, kiu subskribis kontrakton kun firmao de Malto. Tiel, kvankam la Internacia Kortumo de Arbitracio arbitracie kvazaŭ-juĝis pri la afero, nun tiu decido povus esti prezentita, simile al apelacio, antaŭ jurisdikcia organo de unu el la ŝtatoj.

Krimoj en la Antarkta Kontinento

José María Rodríguez (Hispanio)

Kiam oni pripensas la antarktan kontinenton, aperas sur nia menso glaciaj pejzaĝoj, kie deliktoj kaj krimoj forestas, ĉefe pro la fakto, ke sur la blanka kontinento nur loĝas sciencistoj kaj teknikistoj. Same, konfliktoj pri propriereco tute ne aperas, tie mono apenaŭ utilas kaj privataĵoj ne ekzistas. Tamen, soleco, ekstremaj temperaturoj kaj konstanta kunvivado de homoj en malgrandaj spacoj povas kaŭzi problemojn. Eble pro tio, la Antarkta Traktato, subskribita en Vaŝingtono en la jaro 1959, kun ekvalido de 1961, proklamas sur la artikolo 8-a, ke civitanoj de ĉiu ŝtato submetas sin sub la jurisdikcio de tiu ŝtato, kiam ili troviĝas en Antarktio.



Ĉilia antarkta bazo "General Bernardo O'Higgins Riquelme"

Dum-somere loĝas en la antarkta kontinento proksimume 4000 homoj, sed dum la vintra scienca kampanjo ili estas apenaŭ 1000. Oni povas pensi, ke tiel malgranda hom-kvanto, ĉiuj ili sciencistoj aŭ teknikistoj, ne okazigas jurajn problemojn aŭ ke ili estus nur anekdotaj aferoj, sed male, kelkaj krimoj jam okazis dum la mallonga historio de la homo sur ĉi tiu kontinento.

En la jaro 1996, du kuiristoj de la usona bazo McMurdo interbatiĝis. Rezulte, unu el ili frapis la alian per martelo. Unuafoje en la historio de la kontinento usonaj policoj devis iri en Antarkton por aresti iun. Fine, la agresanto estis juĝata en Havajo, la usona ŝtato plej proksima al Antarkto. Tie, tribunalo kondamnis lin je 4-jara enkarcerigo.



Rodney Marks 1968 ~ 2000

Kvankam la Antarkta Traktato disponas, ke ĉiu ŝtato prijuĝos aferojn rilatajn al siaj civitanoj, ofte ĉi tio ne estas tiel klara afero. En la jaro 2000 aŭstralia sciencisto Rodney Marks mortis pro venenado. Marks laboris ĉe la usona stacio Admunsen-Scott, kiu troviĝas en Ross-dependejo, teritorio depostulita de Nov-Zelando, malgraŭ la fakto ke laŭ la Traktato neniu depostulo estas akceptata. Do, kiu devus priesplori tiun krimon? Ĉu Aŭstralio, pro la civitaneco de la sciencisto? Ĉu Usono, pro la bazo kie okazis la morto?

Fine, ambaŭ ŝtatoj decidis, ke la kazo estus priesplorata de nov-zelanda polico. Post kelkjara enketo neniu fina senduba rezulto estis proponata. Tiel, laŭ polico, Rodney Marks mortis pro metanol-venenado, sed oni ne trovis respondenculon pri tio. Polico parolis pri ebla mem-mortigo aŭ eĉ pri ŝerco inter kunuloj kun terura fino. Polico ankaŭ elstaris la fakton, ke la morto en la antarkta kontinento ege influis en la priesplorado de la ebla krimo. Tiel, estis necese atendi 6 monatojn inter la morto de Rodney Marks kaj la ekigo de la polica enketo, eĉ por la nekropsio, pro transportaj problemoj inter la antarkta bazo kaj nov-zelanda teritorio. Krome, la polico ankaŭ plendis pri manko de kunlaboro de la usonaj respondeculoj de la bazo.


Alia krimo okazis en la jaro 2018 en la rusa bazo Bellingshausen. Tiam elektriika inĝeniero Sergei Savitsky ĵetis sin sur Oleg Beloguzov, lutisto en tiu bazo. Savitsky enpuŝis ponardon en la bruston de Beloguzov. La incidento okazis dumnokte, kiam, ŝajne, vodko abundis post nokto-manĝo, kvankam ambaŭ homoj antaŭe travivis pliajn disputajn momentojn. Beloguzov estis tuj transportita en la plej proksiman hospitalon, en la sudo de Ĉilio. Tie, li estis operaciita kaj feliĉe li savis sian vivon. La atakanto estis arestita kaj "enkarcerigita" ene de ortodoksa ĉapeleto de la bazo, ĉar tie ne ekzistis prizono. Post kelkaj semajnoj li estis sendita en Rusion, kie li estis juĝata. Tamen, pro la fakto, ke la viktimo resaniĝis kaj la atakanto pardon-petis, definitive la rusaj

aŭtoritatuloj fermis tiun proceson. Fina kaŭzo laŭ polica enketo estis psikologiaj problemoj pro la absolute soleca etoso de la antarkta bazo.

Psikologoj jam avertis, ke malgraŭ la sciencaj celoj de la antarktaj bazoj kaj la alta intelekta nivelo de teknikistoj tie loĝantaj, la teruraj klimataj kondiĉoj, la preskaŭ ne-videbleco de suno dum semajnoj kaj la konstanta apudeco de samaj homoj, ofte sen ret-aliro, povas provoki psikologiajn problemojn.



En la usona filmo "Whiteout" (2009) policano Carrie Stetko (Kate Beckinsale) devas trovi kulpanton pri murdo ĉe antarkta bazo



Kiam la mano de Dio elektis

Lukas Toczki

Antaŭ multaj jaroj, en centr-eŭropa urbo okazis duelo inter kavaliroj. Dueloj tie estis tute malpermesitaj kaj la kondamno, se iu mortigis la alian duelanton, estis morto-puno. Malgraŭ tio, dueloj ne estis maloftaj en tiu tempo. Okazis do, dum obskura vintra nokto, ke du kavaliroj elingigis siajn glavojn post diskuto, reale oni ne konas la kialon, ĉu pro mon-ŝuldo, ĉu pro am-deklaro al iu virino, ĉu pro malbonsorta karto-ludo.

Lukto estis tre rapida. Unu el la kavaliroj enbatis sian glavon en la bruston de la alia duelanto, kiu falis morte vundita kaj kun siaj manoj trempitaj en sango. Dum sia falo li metis sian manon sur la pordon de unu el la tieaj domoj. Ĝi restis signita per la sang-plena spuro de la mortinto. La duel-venkinto fuĝis kiel eble plej rapide el tiu obskura strato.



Post kelkaj horoj trapasis tiun lokon kelkaj gardistoj. Ili trovis la mortinton kaj la sangan manon sur la apuda pordo. Kompreneble, neniun spuron pri la murdinto ili sukcesis trovi.

Kiam la reĝo konis tiun novaĵon, li tuj furioziĝis. La mortinto estis lia propra frato. Li demandis unu fojon post alia, kiu estis la murdisto. Gardistoj informis al li, ke neniun respondeculo estis trovita. Neniu spuro ekzistis por diveni senerare kiu estis la murdisto, okulfrapis nur sanga mano pentrita sur pordo de apuda domo.

Tiam, la reĝo demandis:

- Ĉu homo loĝanta en tiu domo povus esti la murdinto? Eble mia frato, post ricevi mortigan glavo-vundon, volis lasi lastan informon per sia sanganta mano pri la respondeculo de tiu fiago.

Por kontentigi la reĝon, gardistoj demandis al ĉiuj najbaroj de tiu strato. Ĉiuj respondis same, ĉe tiu domo loĝis sola maljunulo, kiu ne havis sufiĉan forton por svingi glavon, ankaŭ ne por lukti kontraŭ juna kaj forta kavaliro.

Dume, la reĝo pli kaj pli malesperis. Krime kontraŭ lia propra frato ne povis resti sen justa respondo. Male, ĉiuj malamikoj pensis, ke oni povas ataki la reĝon kaj eviti ricevi punon pro tio. Iu, kiu ajn, devus esti la respondeculo de tiu murdo. Li eĉ ne povis imagi, ke murdinto trankvile promenus sur-strate post murdi fraton de reĝo, do preskaŭ princon. Do, li ordonis al gardistoj aresti la maljunulon. Li, iel ajn, devus konfesi, ke li estis la murdinto. Tion ili faris, tamen eĉ ne unu vorto pri konfeso eliris el lia buŝo, eĉ post suferi mil turmentojn.



Sen pruvoj, sen kialoj, sen ajna memkulpigo, sen akuzoj de gardistoj aŭ najbaroj, la reĝo konvikis al la plej grava juĝisto de la plej alta kortumo ekigi pun-proceson kontraŭ tiu maljunulo. Ĉe la kron-salono la reĝo akceptis la juĝiston, li diris:

- Ne demandu al mi kial mi scias, ke tiu maljunulo, kun afabla mieno, murdis mian fraton. Mi scias tion kaj tio sufiĉas. Mi estas reĝo per la graco de Dio, kaj Dio mem montris al mi, ke tiu maljunulo estis la murdinto de mia frato. Tamen, mi estas justa reĝo, do mi ne povas plenumi venĝon kontraŭ li. Mia senlima mizerikordo havigos al li justan juĝon kaj vi estos la juĝisto en tiu proceso. Mi estas tute certa, ke vi kapablos deklari justan juĝon, per kiu li estos kondamnita. Se tiel, grandaj profitoj atendas vin en la regnolando.

La juĝisto eliris el la palaco, li pripensis ĉion diritan de la reĝo. La regnestro parolis pri justa proceso...sed kun jam antaŭprenita decido; pri la sola pruvo ekzistanta...sed sciigita de Dio mem. Li estis juĝisto de antaŭ multaj jaroj kaj tiu proceso ne ŝajnis esti tre justa. Tamen, li havis familianojn, bienojn kaj posedaĵojn, li timis reagon de la reĝo, se li ne plenumis ĉion postulatan de la monarko.

Post kelkaj semajnoj la proceso komenciĝis. La reĝa prokuroro rimarkigis, ke la supro de la sanganta mano ĉe la pordo estis sendubebla pruvo pri la kulpeco de la posedanto de tiu domo. Do, kiam la frato de la reĝo stampis sian manon sur la pordon, en siaj lasta vivo-instantoj, li volis sciigi al ĉiuj kiu estis la murdinto. La advokato defendis la akuziton. Li prezentis antaŭ la juĝisto la najbarojn, kiuj asertis, ke li ne estus kapabla damaĝi iun. Li ankaŭ venigis la gardistojn. Ili asertis, ke ili povis vidi nenion, nek eblan murdinton, nek la maljunulo troviĝis tie, nur okulfrapis la mano stampita. Certe, la postulo de la reĝo kulpigi la maljunulon ankaŭ estis konata de la gardistoj.



La juĝisto atente aŭskultis ĉiujn. Verdire, oni ne pruvis la kulpecon de la akuzito, tamen tiu stampita mano sur lia domo ne estis favora al li. Tamen, ĉi tiu pruvo ne povus esti la sola kialo de ebla kondamno al li.

Proceso finiĝis kaj la juĝisto pripensis decidon dum kelkaj semajnoj. Li ne konsideris, ke la akuzito estis kulpa pri la murdo, tamen sur

lia menso aperis konstante la averto de la reĝo pri la senduba kulpeco de la maljunulo. Kiam alvenis la momento aŭskulti lian decidon amaso da homoj troviĝis ĉe la granda salono de la kortumo. La juĝisto tiam diris:

- Mi aŭskultis dum la pasintaj tagoj atestojn pri la agado de la akuzito dum la nokto, kiam malfeliĉe okazis murdo. Ni aŭskultis gardistojn, ankaŭ najbarojn, la akuzito eĉ rajtis paroli antaŭ ĉi tiu tribunalo. Kaj rezulte de ĉi ĉiuj eldiraĵoj nenio rezultis tute klara, ĉu la akuzito kulpas pri murdo aŭ ne.

Per ĉi tiuj vortoj la juĝisto ne volis kondamni la akuziton, tamen li ankaŭ ne povis malobservi la sugeston, aŭ pli bone dirite la ordonon, de la reĝo pri la senduba kulpeco de la akuzito. Tiam la juĝisto daŭris:

- Ĉar Dio ne konsentos puni ne-kulpulon, ni lasu al Dia justico kondamnon aŭ absolvon de la akuzito. Pro tio mi skribis sur ĉi tiuj notetoj du simplajn vortojn. Sur unu el ili aperas la vorto KULPA, sur la alia SENKULPA. Mi lasos ĉi tiujn fermitajn paperojn antaŭ la akuzito. Do, li mem devos elekti unu, sciante, ke ne estos li, sed la mano de Dio, tiu kiu elektos la verdikton.



Tuj poste, li lasis du paperetojn antaŭ la benko kie sidiĝis la akuzito. Ambaŭ paperoj estis tute fermitaj, tiel la akuzito ne povis antaŭ-koni la rezulton de la elekto.

Tamen ĉi ĉio estis ruzaĵo. La juĝisto volis kondamni la akuziton, laŭ la postulo de la reĝo, tamen li ne povis kondamni iun, kiu tutklare estis senkulpa. Do, li decidis, ke la akuzito mem elektus verdikton. Sed, por certigi la rezulton, la juĝisto ne skribis sur la paperojn la vortojn "kulpa" kaj "senkulpa". Tute ne! Sur ambaŭ skribaĵoj aperis la vorto "kulpa". Do, vole-vole la elekto ĉiam estus sama: la akuzito estus kulpa je murdo.

Ambaŭ fermitaj paperetoj troviĝis sur tablo antaŭ la akuzito. Li, antaŭ ol preni unu el ili, hezitis. Kion fari? Ĉu vere la mano de Dio helpus lin dum la elekto? Li daŭre hezitis dum kelkaj pliaj minutoj. Tiam, la juĝisto avertis lin:

- Ekdecidu jam kaj fidu la helpon de la mano de Dio!

Tiumomente la akuzito komprenis ĉion. Li rapide prenis unu el la paperetoj. Kiu el ili? Ĉu tiu sur la dekstra flanko? Ĉu sur la maldekstra? Ba! Tute ne gravas! La paperon, ankoraŭ fermitan, li metis en sian buŝon kaj rapide li englutis ĝin.

- *Kion vi faras?*-ekkriis la juĝisto. *Ni nun ne povos koni kiun vorton aperis sur la papero. Kial vi englutis ĝin?*

- *Nu, -respondis la akuzito. Mia elekto estas simple kaj facile divenebla. Mi elektis la kontraŭan verdikton al tiu skribita sur la papero kiu ankoraŭ troviĝas sur la tablo.*

Jes, fakte se sur ambaŭ paperoj aperis skribitaj malsimilaj vortoj, tuj post legi la papereton kiu ankoraŭ troviĝis sur la tablo estis eble koni la paperon elektitan de la akuzito.

Publiko ĉe la salono stariĝis. Ili decidis koni kiel eble plej baldaŭ la tekston de la papereto, kiu ankoraŭ restis sur la tablo. Ankaŭ la juĝisto stariĝis. Li lante ekmalfermis la paperon. Sur ĝi, kompreneble, aperis la vorto: KULPA.

Do, la papero elektita de la akuzito, tiu englutita de li, montras la kontraŭan decidon: SENKULPA. La juĝisto devis akcepti tion. Li tiam komprenis, ke la mano de Dio kapablas elekti la plej saĝan solvon, eĉ kiam ekzistas neniu ŝanco por tio.



TTT-paĝo de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

www.esperantojuro.org

The screenshot shows the homepage of the Esperanto Jurist Association website. At the top, there is a navigation bar with a green star logo and the text "Internacia Jurista Esperanto-Asocio". To the right of the logo are several menu items: "I.J.E.A.", "Revuo", "Kursoj", "Jura Vortaro", "Statuto", "Libroj", "Universalaj Tekstoj", "Estraro", and a black "Kontakto" button. Below the navigation bar is a main content area with a light orange background. It features four columns of content: 1. A golden statue of Lady Justice holding scales and a sword, with the text "Kio estas la Internacia Jurista Esperanto-Asocio?". 2. A white document cover for "JURA TRIBUNO INTERNACIA" with a blue section symbol (§) and the text "Oficiala organo de I.J.E.A.". 3. An open book with a magnifying glass over it, with the title "Vortaro" and subtitle "Jura Terminologio". 4. A dark blue graphic with white text about data transfer and privacy, with the title "Kursoj" and subtitle "Kurso pri Internacia Mar-Juro".



Juraj Universalaj Tekstoj

Ĉi tie vi trovos la tradukon en Esperanton de gravaj internaciaj juraj tekstoj.



Silento estas konsento...

ĉu vere?

La jura principo "*qui tacet, consentire videtur*", tradukebla kiel "kiu silentas, estas komprenata kiel konsentanto", aŭ pli simple "silento estas konsento", estis unufoje esprimita de la Papo Bonifaco la 8-a en lia verko "*Liber Sextus*" en la jaro 1298. Kvankam, verdire, la aŭtoro de tiu aforismo estis la florenca juristo Dino del Mugello (1254-1303). Sur la 12-a ĉapitro de tiu verko, kun la titolo "*De regulis juris*", oni diras jenon:

Regulo 43: Qui tacet, consentire videtur.

Kiu silentas, estas komprenanta kiel konsentanto.

Regulo 44: Qui tacet, non fatetur, sed nec utique negare videtur.

Kiu silentas, certe ne konfesas, tamen ankaŭ ne neas.

Vere, ambaŭ normoj ŝajnas kontraŭdiri unu la alian. Tiel, la unua komprenigas silenton kiel konsenton, sed la dua reale asertas, ke tutcerte ne estas konsento, tamen ankaŭ ne rifuzo. Tio estas, en ĉiu konkreta kazo oni devas kompreni la sencon de la silento.

Do, ĉu silento, el jura vidpunkto, signifas konsenton aŭ ne?



En la historia vidpunkto, oni ne povas ĝeneraligi la signifon de silento en la juraj rilatoj. Tiel, rilate negocojn, akcepto de partioj, tio estas ne nur silento, devas nepre okazi. Tamen, sur aliaj juraj situacioj silenti ja signifis akcepti. Ekzemple, kiam patro devis akcepti aŭ rifuzi edziniĝon de sia filino, klasika jurisprudenco akceptis, ke silento de la patro, post peto de la onta edzo, tute validis kiel konsento.

Tamen, se oni parolas pri simplaj dialogoj, konversacioj aŭ debatoj pri kiu ajn afero, tio estas ne-jura situacio, silento de unu el la debatantoj povus esti komprenata kiel konsento. Sed, el jura vidpunkto silenti signifas nek konsenton, nek rifuzon, silenti estas nur silenti.

Ĉi tio estas pli grava, ekzemple, okaze de pun-juraj procesoj. Tiel, kiam oni prezentas al akuzito evidentajn pruvojn kontraŭ li, se li silentas, tio estas li ne neas, tio neniel devas esti komprenata kiel akcepto de tiuj pruvoj.



Nuntempe juristoj distingas inter simpla kaj kondiĉa silentoj.

Simpla silento estas tiu, kiu estiĝas kiam normo postulas nepran eldiraĵon se konkreta cirkonstanco okazas. Do, silento signifas, ke tio ne okazas. Ni vidu ekzemplon: se aĉetanto akiras varon, ofte leĝoj disponas, ke vendanto devas averti pri ne-videblaj difektoj de tiu varo. Do, se vendanto silentas tio signifas, ke tiu varo ne havas malperfektaĵon. Ĉi-kaze, vendanto ne rajtas diri, ke lia silento estis nur silento, male, lia silento estis konsento pri konkreta stato de tiu varo.

Rilate kondiĉan silenton, ĉi-kaze ekzistas neniu devo mencii ion dum la efektivigo de jura negoco, do silenti estas nur silenti, tio estas nek akcepti nek rifuzi ion. Tiu estas la senco, ekzemple, de la artikolo 18-a de la Konvencio de Vieno de 1980, pri internacia aĉeto-vendado de varoj, kiu disponas, ke silento aŭ ne agado ne povas esti komprenataj kiel akcepto aŭ konsento.

Resume, malgraŭ la klasika aforismo silento ne povas esti komprenata kiel konsento aŭ akcepto de propono, escepte kiam konkreta leĝo havigas al ĝi tiun signifon. Tamen, se tio ne okazas, silento estas nur silento.

Galerio de elstaraj esperantistaj juristoj



Józef Litauer

Pollando 1894 ~ Dua mondmilito

Advokato. Kunlaboranto de Pola Socialista Partio kaj kunfondanto de Esperanto-Rondo "Konkordo" en Varsovio en 1921. Li agis kiel ĝenerala sekretario kaj prezidanto de Laborista Esperanto Asocio "Laboro" en Pollando. Ĝis 1931 li estis ĝenerala sekretario de Internacia Societo de Esperantistaj Juristoj. En 1933 li fondis la Socialisman Esperanto-Societon. En 1946 aperis en listo kiel mortigito de nazioj dum la dua mondmilito, sen plia precizigo.



Kino kaj



Juro

La proceso kontraŭ la 7 de Ĉikago

La filmo pritraktas realajn okazintaĵojn, konkrete juĝan proceson kontraŭ sep aktivistoj, kiu manifestaciis kontraŭ la vjetnama milito dum la Nacia Demokrata Konvencio en Usono en la jaro 1968. Kelkajn monatojn post tiuj protestoj, ili estas arestitaj kaj akuzitaj planadi insurekcion.

Jam en la komenco de la jura proceso, la juĝisto Julius Hoffman (Frank Langella) montras videblajn antaŭjuĝojn kontraŭ la akuzitoj. Li eĉ malaprobis kelkajn kandidatojn esti membroj de la juĝistaro. La filmo montras la grandan influon de juĝistoj dum jura proceso. Tiel, iliaj decidoj povas esti garantio de fundamentaj

rajtoj aŭ male, taŭga instrumento por malobservi ilin. Samtempe, estas eble vidi kiamaniere koruptado kaj misuzo de aŭtoritato damaĝas ne nur akuzitojn, sed ankaŭ la socian fidon rilate regantojn kaj la juran sistemon mem. Do, kiam juraj institucioj ne estas neŭtralaj, la politika sistemo malfortiĝas.



The Trial of the Chicago 7. (2020) Produktita de DreamWorks Pictures. Reĝisorita de Aaron Sorkin. Ĉefaj aktoroj: Yahya Abdul-Mateen II, Sacha Baron Cohen, Daniel Flaherty, Joseph Gordon-Levitt, Michael Keaton, Frank Langella, John Carroll Lynch, Eddie Redmayne, Noah Robbins, Mark Rylance, Alex Sharp kaj Jeremy Strong.

La advokato konstruis sian argumentadon sur kritiko kontraŭ la jura sistemo mem. Do, anstataŭ rifuzi akuzojn, li preferis elmontri la politikan naturon de tiuj akuzoj. Same, dum la proceso, akuzitoj profitis ĉiujn deklarojn por defii la povon de la juĝisto kaj ridindigi lin. Ĉi ĉio altiris la atenton de amasmedioj, kiuj tuj informis al publiko pri la disvolviĝo de la proceso kaj pri la rakto malakordi ene de demokratia politika sistemo.



Sceno de la filmo "La proceso kontraŭ la 7 de Ĉikago" (2020)

Kiel lastan eldiraĵon, la advokato mencias la nomojn de la ĝistiamaj 4752 usonaj soldatoj viktimoj de tiu milito, ni sciu, ke la jura proceso okazis en la jaro 1968. Dum ĉi tiu legado ĉeestantoj starigas kaj aklamas.

Unuinstanca juĝo deklaris la akuzitojn senkulpaj pri konspirado, tamen kvin el ili estis kondamnitaj pro instigo al ribelado. Post apelacio ĉiuj akuzitoj estis absolvitaj. Same, oni konfirmis en la apelacio ke dum la juĝa proceso okazis multnombraj ne-normalaĵoj. Filmo finiĝas per epilogo, kie oni rakontas postajn vivojn de ĉefroluloj.

Ĉi tiu filmo ricevis pozitivajn kritikojn. Ĝi estis kandidato por ricevi ses oskar-premiojn, inter ili premion al la plej bona filmo. Tamen, fine la filmo atingis neniun oskar-premion.



INTERNACIAJ TRAKTATOJ TRADUKITAJ EN ESPERANTON

Deklaracio de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj

La Rezolucio 61/295 akceptita de la Ĝenerala Asembleo la 13an de septembro 2007.

La Ĝenerala Asembleo

Gvidate de la celoj kaj principoj de la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj kaj de bona konfido pri la realigo de la sindevigoj alprenitaj de Ŝtatoj kongrue kun la Ĉarto,

Asertante, ke indiĝenaj popoloj estas egalaj al ĉiuj aliaj popoloj, kaj samtempe rekonante la rajton de ĉiuj popoloj esti malsamaj, konsideri sin malsamaj, kaj esti respektataj kiel tiaj,

Asertante ankaŭ, ke ĉiuj popoloj kontribuas al la diverseco de civilizoj kaj kulturoj, kiuj konsistigas la komunan heredaĵon de la homaro,

Asertante plue, ke ĉiuj doktrinoj, politikoj kaj praktikoj bazitaj je, aŭ argumentantaj por, la supereco de popoloj aŭ individuoj surbaze de nacia origino aŭ rasaj, religiaj, etnaj aŭ kulturaj diferencoj estas rasistaj, science falsaj, jure nevalidaj, morale kondamnindaj, kaj socie maljustaj,

Reasertante, ke indiĝenaj popoloj en la uzado de siaj rajtoj estu liberaj de ĉiu diskriminacio,

Maltrankvilaj, ke indiĝenaj popoloj suferis tra la historio maljustecojn rezulte de, interalie, ilia koloniigo kaj la misproprietigo de iliaj teroj, teritorioj kaj resursoj, tiel ke ili estis malhelpataj uzadi precipe sian rajton je evoluo kongrue kun la propraj bezonoj kaj interesoj,

Rekonante la urĝan bezonon respekti kaj antaŭenigi la esence proprajn rajtojn de indiĝenaj popoloj devenantajn el iliaj politikaj, ekonomiaj kaj sociaj strukturoj kaj el iliaj kulturoj, spiritaĵoj, tradicioj, historioj kaj filozofioj, precipe iliaj rajtoj al la propraj teroj, teritorioj kaj resursoj,

Rekonante ankaŭ la urĝan bezonon respekti kaj antaŭenigi la rajtojn de indiĝenaj popoloj asertatajn en traktatoj, interkonsentoj kaj aliaj pozitivaj aranĝoj kun Ŝtatoj,

Bonvenigante la fakton, ke indiĝenaj popoloj estas sin organizantaj por politika, ekonomia, socia kaj kultura plibonigo kaj por definitive porti al fino ĉiujn formojn de diskriminacio kaj subpremo, kie ajn ili okazas,

Konvinkite, ke regado fare de indiĝenaj popoloj super evoluoj kiuj havas efikon je ili kaj iliaj teroj, teritorioj kaj resursoj ebligas al ili konservi kaj fortigi siajn instituciojn, kulturojn kaj tradiciojn, kaj antaŭenigi sian evoluon kongrue kun siaj aspiroj kaj bezonoj,

Rekonante, ke respekto de indiĝenaj scioj, kulturoj kaj tradiciaj praktikoj kontribuas al daŭripova kaj egaleca evoluo kaj taŭga mastrumado de la natura medio,

Emfazante la kontribuon de la senmilitigo de la teroj kaj teritorioj de indiĝenaj popoloj apoge al paco, ekonomia kaj socia progreso kaj evoluo, interkompreno kaj amikaj rilatoj inter nacioj kaj popoloj de la mondo,

Speciale rekonante la rajton de indiĝenaj familioj kaj komunumoj pluteni komunan respondecon por la edukado, trejnado, klerigo kaj bonfarto de siaj infanoj, konforme al la rajtoj de infanoj,

Konsiderante, ke la rajtoj asertataj en traktatoj, interkonsentoj kaj aliaj pozitivaj aranĝoj inter Ŝtatoj kaj indigenaj popoloj estas, en certaj situacioj, aferoj de internaciaj koncernoj, intereso, respondeco kaj karaktero,

Konsiderante ankaŭ, ke traktatoj, interkonsentoj kaj aliaj pozitivaj aranĝoj, kaj la rilatoj kiujn ili reprezentas, formas la bazon de plifortigita partnereco inter indiĝenaj popoloj kaj Ŝtatoj,

Agnoskante, ke la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la Internacia Pakto pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj, kiel ankaŭ la Viena Deklaracio kaj Programo de Agado asertas la fundamentan gravecon de la rajto je memdetermino de ĉiuj popoloj, surbaze de kiu ili libere decidas sian politikan statuson kaj libere plusekvas sian ekonomian, socian kaj kulturen evoluon,

Konsciante, ke nenio en tiu ĉi Deklaracio estu uzata por fornei de iuj ajn popoloj ilian rajton al memdetermino uzatan konforme al la internacia juro,

Konvinkite, ke la rekono de la rajtoj de indiĝenaj popoloj en tiu ĉi Deklaracio plibonigos harmoniajn kaj kunlaboremajn rilatojn inter la Ŝtato kaj indiĝenaj popoloj, surbaze de principoj de justeco, demokratio, respekto de la homaj rajtoj, nediskriminacio kaj bona konfido,

Kuraĝigante Ŝtatojn obei, kaj efike realigi, ĉiujn siajn devojn tiel kiel ili aplikiĝas al indiĝenaj popoloj laŭ internaciaj instrumentoj, precipe tiuj kiuj rilatas al homaj rajtoj, en konsulto kaj kunlaboro kun la koncernaj popoloj,

Emfazante, ke Unuiĝintaj Nacioj nature posedas gravan kaj daŭran rolon en antaŭenigo kaj protektado de la rajtoj de indiĝenaj popoloj,

Kredante, ke tiu ĉi Deklaracio estas plia grava antaŭenpaso al rekono, antaŭenigo kaj protektado de la rajtoj kaj liberecoj de indiĝenaj popoloj kaj al evoluigo de taŭgaj agadoj de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj ĉi-kampe,

Rekonante kaj reasertante, ke indiĝenaj individuoj estas rajtigataj sen diskriminacio al ĉiuj homaj rajtoj rekonataj en la internacia juro, kaj ke indiĝenaj popoloj posedas kolektivajn rajtojn kiuj estas nemalhaveblaj por iliaj ekzisto, bonfarto kaj integra evoluo kiel popoloj,

Rekonante, ke la situacio de indiĝenaj popoloj varias de regiono al regiono kaj de lando al lando kaj ke la signifo de naciaj kaj regionaj apartecoj kaj de diversaj historiaj kaj kulturaj fonoj estu prenataj en konsideron,

Solene proklamas la ĉi-sekvan Deklaracion de Unuiĝintaj Nacioj pri la Rajtoj de Indiĝenaj Popoloj kiel normon de atingo sekvendan en spirito de partnereco kaj reciproka respekto:

Artikolo 1

Indiĝenaj popoloj rajtas je plena ĝuado, kiel kolektivo kaj kiel individuoj, de ĉiuj homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj tiel kiel ili estas rekonataj en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj internacia homrajta juro.

Artikolo 2

Indiĝenaj popoloj kaj individuoj estas liberaj kaj egalaj al ĉiuj aliaj popoloj kaj individuoj kaj rajtas esti liberaj je ĉiu speco de diskriminacio, en la uzado de siaj rajtoj, speciale tiuj kiuj baziĝas je ilia indiĝenaj deveno aŭ identeco.

Artikolo 3

Indiĝenaj popoloj havas rajton je memdeterminado. Sekve de tiu rajto ili libere determinas sian politikan statuson kaj libere sekvas sian ekonomian, socian kaj kulturalan evoluon.

Artikolo 4

Indiĝenaj popoloj, utiligante sian rajton je memdeterminado, rajtas je autonomio aŭ memregado en situacioj kiuj rilatas al iliaj internaj kaj lokaj aferoj, kiel ankaŭ al metodo kaj kapabloj financi siajn autonomajn funkciojn.

Artikolo 5

52 Indiĝenaj popoloj rajtas konservi kaj plifortigi siajn apartajn politikajn, jurajn,

ekonomiajn, sociajn kaj kulturajn instituciojn, dume plutenante sian rajton plene partopreni, se ili tiel decidas, la politikan, ekonomian, socian kaj kulturen vivon de la Ŝtato.

Artikolo 6

Ĉiu indiĝena individuo rajtas je nacieco.

Artikolo 7

1. Indiĝenaj individuoj rajtas je vivo, fizika kaj mensa integreco, libereco kaj persona sekureco.
2. Indiĝenaj popoloj havas kolektivajn rajton vivi en libereco, paco kaj sekureco kiel apartaj popoloj kaj ne estu submetataj al iu genocida ago aŭ iu ajn alia perforta ago, inkluzive la perfortan forigon de la infanoj de la grupo al iu ajn alia grupo.

Artikolo 8

1. Indiĝenaj popoloj kaj individuoj rajtas ne esti submetataj al perforta asimilado aŭ detruo de ilia kulturo.
2. Ŝtatoj provizu efikajn mekanismojn por prevento de kaj kompenso por:
 - (a) Iu ajn ago kies celo aŭ efiko estas forigi de ili ilian integrecon kiel apartaj popoloj, aŭ iliajn kulturajn valorojn aŭ etnajn identecojn;
 - (b) Iu ajn ago kies celo aŭ efiko estas senproprietigo de iliaj teroj, teritorioj aŭ resursoj;
 - (c) Iu ajn formo de perforta popola translokado kies celo aŭ efiko perfortas aŭ subfosas iujn ajn iliajn rajtojn;
 - (d) Iu ajn formo de perforta asimilado aŭ integriĝo;
 - (e) Iu ajn formo de propagando kiu celas antaŭenigi aŭ inciti rasan aŭ etnan diskriminacion direktatan kontraŭ ili.

Artikolo 9

Indiĝenaj popoloj kaj individuoj rajtas aparteni al indiĝena komunumo aŭ nacio, kongrue kun la tradicioj kaj kutimoj de la koncerna komunumo aŭ nacio. Neniu diskriminacio de kiu ajn speco ekestu el la uzado de tia rajto.

Artikolo 10

Indiĝenaj popoloj ne estu perforte forigataj de siaj teroj aŭ teritorioj. Neniu relokiĝo okazu sen la libera, anticipa kaj informita konsento de la koncernaj indiĝenaj popoloj kaj post interkonsento pri justa kaj egaleca kompenso kaj, tie

kie tio eblas, opcio de reveno.

Artikolo 11

1. Indiĝenaj popoloj rajtas praktiki kaj revivigi siajn kulturajn tradiciojn kaj kutimojn. Tio inkluzivas la rajton konservi, protekti kaj evoluigi la pasintajn, nunajn kaj estontajn manifestigojn de siaj kulturoj, kiel ekzemple arkeologiajn kaj historiajn lokojn, objektojn, desegnojn, ceremoniojn, teknologiojn kaj vidajn kaj ludajn artojn kaj literaturon.

2. Ŝtatoj liveru kompenson per efikaj mekanismoj, kiuj povu inkluzivi redonon, ellaboritaj kunlabore kun indiĝenaj popoloj, rilate iliajn kulturajn, intelektajn, religiajn kaj spiritajn proprietaĵojn forprenitajn sen ilia libera, anticipa kaj informita konsento aŭ kontraŭe al iliaj leĝoj, tradicioj kaj kutimoj.

Artikolo 12

1. Indiĝenaj popoloj rajtas manifesti, praktiki, evoluigi kaj instrui siajn spiritajn kaj religiajn tradiciojn, kutimojn kaj ceremoniojn; rajtas konservi, praktiki kaj aliri en privateco siajn religiajn kaj kulturajn lokojn; rajtas uzi kaj regi siajn ceremoniajn objektojn; kaj rajtas al repatrujigo de siaj homaj restaĵoj.

2. Ŝtatoj celu ebligi aliron al, kaj/aŭ repatrujigon de ceremoniaj objektoj kaj homaj restaĵoj kiujn ili posedas, per justaj, travideblaj kaj efikaj mekanismoj evoluigitaj kunlabore kun la koncernaj indiĝenaj popoloj.

Artikolo 13

1. Indiĝenaj popoloj rajtas revivigi, utiligi, evoluigi kaj transdoni al estontaj generacioj siajn historiojn, lingvojn, perbusajn tradiciojn, filozofiojn, skribsistemojn kaj literaturojn, kaj asigni kaj reteni siajn proprajn nomojn por komunumoj, lokoj kaj personoj.

2. Ŝtatoj faru efikajn paŝojn por certigi, ke tiu rajto estu protektata, kaj ankaŭ por certigi ke indiĝenaj popoloj povu kompreni kaj esti komprenataj en politikaj, juraj kaj administraj procedoj, se necese per liverado de interpretado aŭ per aliaj taŭgaj rimedoj.

Artikolo 14

1. Indiĝenaj popoloj rajtas starigi kaj regi siajn edukajn sistemojn kaj siajn instituciojn liverantajn edukadon en iliaj propraj lingvoj, laŭ maniero taŭga al iliaj kulturaj metodoj de instruado kaj lernado.

2. Indiĝenaj individuoj, precipe infanoj, rajtas al ĉiuj niveloj kaj formoj de edukado de la Ŝtato sen diskriminacio.

3. Ŝtatoj, kunlabore kun indiĝenaj popoloj, faru efikajn paŝojn por ke indiĝenaj

individuoj, precipe infanoj, inkluzive de tiuj kiuj loĝas ekster siaj komunumoj, havu aliron, kiam eblas, al edukado en la propra kulturo kaj liverata en ilia propra lingvo.

Artikolo 15

1. Indiĝenaj popoloj rajtas je la digno kaj diverseco de siaj kulturoj, tradicioj, historioj kaj aspiroj, kiuj estu taŭge spegulataj en edukado kaj publika informado.
2. Ŝtatoj faru efikajn paŝojn, en konsulto kaj kunlaboro kun la koncernaj indiĝenaj popoloj, por kontraŭbatali antaŭjuĝojn kaj elimini diskriminacion kaj antaŭenigi toleron, komprenon kaj bonajn rilatojn inter indiĝenaj popoloj kaj ĉiuj aliaj elementoj de la socio.

Artikolo 16

1. Indiĝenaj popoloj rajtas starigi la proprajn amasmediojn en la propraj lingvoj kaj aliri ĉiujn formojn de neindiĝenaj amasmedioj sen diskriminacio.
2. Ŝtatoj faru efikajn paŝojn por certigi ke amasmedioj Ŝtate posedataj taŭge spegulu kulturen diversecon. Ŝtatoj, sen lezi plenan liberecon de esprimo, instigu private posedatajn amasmediojn adekvate speguli indiĝenan kulturen diversecon.

Artikolo 17

1. Indiĝenaj individuoj kaj popoloj rajtas plene ĝui ĉiujn rajtojn establitajn laŭ aplikebla internacia kaj enŝtata labora juro.
2. Ŝtatoj, en konsulto kaj kunlaboro kun indiĝenaj popoloj faru specifajn paŝojn por ŝirmi indiĝenajn infanojn el ekonomia ekspluatado kaj el plenumo de ia laboro kiu emas esti danĝera aŭ negative efika al la edukado de la infano, aŭ esti malbonefika al la sanstato de la infano aŭ ties fizika, mensa, spirita, morala aŭ socia evoluo, konsiderante ties apartan vundeblon kaj la gravecon de edukado por ilia povigo.
3. Indiĝenaj individuoj rajtas ne esti submetataj al iuj ajn diskriminaciaj kondiĉoj de laboro kaj, interalie, dungigo aŭ salajro.

Artikolo 18

Indiĝenaj popoloj rajtas partopreni en decidofarado en aferoj kiuj povus havi efikon je iliaj rajtoj, pere de reprezentantoj elektitaj de ili mem akorde kun iliaj propraj proceduroj, kaj ankaŭ konservi kaj evoluigi siajn proprajn indiĝenajn decidofarajn instituciojn.

Artikolo 19

Ŝtatoj interkonsiligu kaj kunlaboru en bona konfido kun la koncernaj indiĝenaj popoloj pere de iliaj propraj reprezentaj institucioj cele al akiro de ilia libera, anticipa kaj informita konsento antaŭ ol adopti kaj realigi leĝfarajn aŭ administrajn paŝojn kiuj povus havi efikon ĉe ili.

Artikolo 20

1. Indiĝenaj popoloj rajtas konservi kaj evoluigi siajn politikajn, ekonomiajn kaj sociajn sistemojn aŭ instituciojn, esti sekuraj en ĝuado de siaj propraj rimedoj de pluvivo kaj evoluo, kaj libere sekvi siajn tradiciajn kaj aliajn ekonomiajn agadojn.

2. Indiĝenaj popoloj senigitaj je siaj propraj rimedoj de pluvivo kaj evoluo rajtas al justa kaj egaleca rekompenco.

Artikolo 21

1. Indiĝenaj popoloj rajtas, sen diskriminacio, al plibonigo de iliaj ekonomiaj kaj sociaj kondiĉoj, inkluzive, interalie, de la medioj de edukado, dungigo, metia trejnado kaj retrejnado, loĝigo, higieno, sano kaj socia asekuro.

2. Ŝtatoj faru efikajn paŝojn kaj, kie taŭge, specialajn paŝojn por certigi daŭran plibonigon de iliaj ekonomiaj kaj sociaj kondiĉoj. Aparta atento estu direktata al la rajtoj kaj specialaj bezonoj de indiĝenaj aĝuloj, virinoj, junuloj kaj handicapitoj.

Artikolo 22

1. Aparta atento estu direktata al la rajtoj kaj specialaj bezonoj de indiĝenaj aĝuloj, virinoj, junuloj kaj handicapitoj en la realigo de tiu ĉi Deklaracio.

2. Ŝtatoj faru apartajn paŝojn, kunlabore kun indiĝenaj popoloj, por certigi, ke indiĝenaj virinoj kaj infanoj ĝuu plenan protekton kaj garantiojn kontraŭ ĉiuj formoj de perforto kaj diskriminacio.

Artikolo 23

Indiĝenaj popoloj rajtas decidi kaj evoluigi prioritatojn kaj strategiojn por uzadi sian rajton al evoluo. Unuavice, indiĝenaj popoloj rajtas esti efike engaĝitaj en evoluigo kaj decido de sanaj, loĝigaj kaj aliaj ekonomiaj kaj sociaj programoj kiuj havas rilaton al ili kaj, tiel kiel tio eblas, administri tiajn programojn pere de la propraj institucioj.

Artikolo 24

1. Indiĝenaj popoloj havas rajton je siaj tradiciaj medikamentoj kaj rajton daŭrigi siajn proprajn sanajn praktikojn, inkluzive de konservado de siaj esencaj medikamentaj plantoj, bestoj kaj mineraloj. Indiĝenaj individuoj ankaŭ havas rajton aliri, sen ajna diskriminacio, ĉiujn sociajn kaj sanajn servojn.
2. Indiĝenaj individuoj havas egalan rajton ĝui la plej altan atingeblan normon de fizika kaj mensa sano. Ŝtatoj faru la necesajn paŝojn cele al progesa atingo de plena realigo de tiu rajto.

Artikolo 25

Indiĝenaj popoloj rajtas konservi kaj fortigi sian apartan spiritan rilaton kun siaj tradicie posedataj aŭ alimaniere okupataj kaj uzataj teroj, teritorioj, akvoj kaj marbordaj maroj kaj aliaj resursoj kaj plenumi siajn tiurilatajn respondecojn al estontaj generacioj.

Artikolo 26

1. Indiĝenaj popoloj rajtas al la teroj, teritorioj kaj resursoj kiujn ili tradicie posedis, okupis aŭ alimaniere uzis aŭ akiris.
2. Indiĝenaj popoloj rajtas posedi, uzi, evoluigi kaj regi la terojn, teritoriojn kaj resursojn kiujn ili posedas pro tradicia proprieto aŭ alia tradicia okupado aŭ uzo, kiel ankaŭ tiujn kiujn ili alimaniere akiris.
3. Ŝtatoj donu juran rekonon kaj protekton al tiuj teroj, teritorioj kaj resursoj. Tia rekono estu plenumata kun taŭga respekto al la kutimoj, tradicioj kaj terposedaj sistemoj de la koncernaj indiĝenaj popoloj.

Artikolo 27

Ŝtatoj starigu kaj realigu, kunlabore kun la koncernaj indiĝenaj popoloj, justan, sendependan, senpartian, malferman kaj travideblan procedon, kiu dediĉu taŭgan atenton al la leĝoj, tradicioj, kutimoj kaj terposedaj sistemoj de indiĝenaj popoloj, por rekoni kaj jure arbitracii la rajtojn de indiĝenaj popoloj rilate al iliaj teroj, teritorioj kaj resursoj, inkluzive tiujn kiuj estis tradicie posedataj aŭ alimaniere okupataj aŭ uzataj. Indiĝenaj popoloj rajtu partopreni en tiu ĉi procedo.

Artikolo 28

1. Indiĝenaj popoloj rajtas al rebonigo, per mekanismoj kiuj povu inkluzivi redonon, aŭ, kie tio ne eblas, justan kaj egalecan kompenson pro la teroj, teritorioj kaj resursoj kiujn ili tradicie posedis aŭ alimaniere okupis aŭ uzis, kaj kiujn oni konfiskis, prenis, okupis, uzis aŭ difektis sen ilia libera, anticipa kaj

informita konsento.

2. Krom se la koncernaj popoloj alimaniere libere konsentis, tia kompenso estu en formo de teroj, teritorioj kaj resursoj egalaj laŭ kvalito, grandeco kaj jura statuso, aŭ de mona kompenso aŭ alia taŭga rekonsistigo.

Artikolo 29

1. Indiĝenaj popoloj rajtas al konservado kaj protektado de la natura ĉirkaŭaĵo kaj la produktiva kapacito de iliaj teroj aŭ teritorioj kaj resursoj. Ŝtatoj starigu kaj realigu programojn de helpado por indiĝenaj popoloj por tiaj konservado kaj protekto, sen diskriminacio.

2. Ŝtatoj faru efikajn paŝojn por certigi, ke neniu deponado aŭ forĵetado de danĝeraj materialoj okazu en la teroj aŭ teritorioj de indiĝenaj popoloj sen ilia libera, anticipa kaj informita konsento.

3. Ŝtatoj faru efikajn paŝojn ankaŭ por certigi, laŭbezzone, ke programoj por kontroli, daŭrigi kaj restarigi la sanon de indiĝenaj popoloj, tiel kiel ili estas evoluigataj kaj realigataj de la popoloj influataj de tiaj materialoj, estas laŭplane realigataj.

Artikolo 30

1. Militaj agadoj ne okazu en la teroj aŭ teritorioj de indiĝenaj popoloj, krom se ili estas pravigataj de aplikebla publika intereso aŭ alimaniere libere interkonsentitaj aŭ petataj de la koncernaj indiĝenaj popoloj.

2. Ŝtatoj entreprenu efikajn konsultadojn kun la koncernaj indiĝenaj popoloj, per taŭgaj proceduroj kaj precipe per iliaj reprezentaj institucioj, antaŭ ol uzi iliajn terojn aŭ teritoriojn por militaj aktivadoj.

Artikolo 31

1. Indiĝenaj popoloj rajtas konservi, regi, protekti kaj evoluigi siajn kulturajn heredaĵon, tradiciajn sciojn kaj tradiciajn kulturajn esprimojn, kiel ankaŭ la manifestiĝojn de siaj sciencoj, teknologioj kaj kulturoj, inkluzive de homaj kaj genetikaj resursoj, semoj, medikamentoj, scio de la proprajoj de faŭno kaj floraro, perbusaj tradicioj, literaturoj, desegnoj, sportoj kaj tradiciaj ludoj kaj vidaj kaj ludaj artoj. Ili ankaŭ rajtas konservi, regi, protekti kaj evoluigi sian intelektan proprieton je tiuj kultura heredaĵo, tradiciaj scioj kaj tradiciaj kulturaj esprimoj.

2. Kunlabore kun indiĝenaj popoloj, Ŝtatoj faru efikajn paŝojn por rekoni kaj protekti la uzon de tiuj rajtoj.

Artikolo 32

1. Indiĝenaj popoloj rajtas fiksi kaj evoluigi prioritatojn kaj strategiojn por evoluigi aŭ uzi siajn terojn aŭ teritoriojn aŭ aliajn resursojn.
2. Ŝtatoj konsultu kaj kunlaboru en bona konfido kun la koncernaj indiĝenaj popoloj tra iliaj propraj reprezentaj institucioj por havigi ilian liberan kaj informitan konsenton antaŭ ol aprobi iun ajn projekton kiu havas efikon je iliaj teroj aŭ teritorioj kaj aliaj resursoj, precipe kunlige kun evoluigo, utiligo aŭ ekspluatado de mineralaj, akvaj kaj aliaj resursoj.
3. Ŝtatoj liveru efikajn rimedojn por justa rebonigo de ĉiuj tiaj agadoj, kaj oni faru taŭgajn paŝojn por mildigi negativajn naturmediajn, ekonomiajn, sociajn, kulturajn aŭ spiritajn efikojn.

Artikolo 33

1. Indiĝenaj popoloj rajtas decidi sian propran identecon aŭ membrecon konforme al siaj kutimoj kaj tradicioj. Tio ne limigas la rajton de indiĝenaj individuoj akiri civitanecon de la Ŝtatoj kie ili vivas.

Indiĝenaj popoloj rajtas decidi la strukturojn kaj elekti la membrecon de siaj institucioj konforme al siaj propraj proceduroj.

Artikolo 34

Indiĝenaj popoloj rajtas antaŭenigi, evoluigi kaj konservi siajn instituciajn strukturojn kaj siajn apartajn kutimojn, spiritecon, tradiciojn, procedurojn, praktikojn kaj, en la okazoj kie ili ekzistas, jurajn sistemojn aŭ kutimojn, konforme al internaciaj homrajtaj normoj.

Artikolo 35

Indiĝenaj popoloj rajtas decidi la respondecojn de individuoj al iliaj komunumoj.

Artikolo 36

1. Indiĝenaj popoloj, precipe tiuj kiujn dividas internaciaj landlimoj, rajtas konservi kaj evoluigi kontaktojn, rilatojn kaj kunlaboron, inkluzive agadojn por spiritaj, kulturaj, politikaj, ekonomiaj kaj sociaj celoj, kun siaj propraj membroj kaj ankaŭ aliaj popoloj trans landlimoj.
2. Ŝtatoj, en konsulto kaj kunlaboro kun indiĝenaj popoloj, faru efikajn paŝojn por faciligi la uzon kaj certigi la realigon de tiu rajto.

Artikolo 37

1. Indiĝenaj popoloj rajtas je rekono, observo kaj apliko de traktatoj, interkonsentoj kaj aliaj pozitivaj aranĝoj starigitaj kun Ŝtatoj aŭ ties posteuloj,

kaj ke Ŝtatoj agnosku kaj respektu tiajn traktatojn, interkonsentojn kaj aliajn pozitivajn aranĝojn.

2. Nenio en tiu ĉi Deklaracio rajtas esti interpretata kiel redukto aŭ elimino de la rajtoj de indiĝenaj popoloj entenataj en traktatoj, interkonsentoj kaj aliaj pozitivaj aranĝoj.

Artikolo 38

Ŝtatoj, konsulte kaj kunlabore kun indiĝenaj popoloj, faru taŭgajn paŝojn, inkluzive jurajn paŝojn, por atingi la celojn de tiu ĉi Deklaracio.

Artikolo 39

Indiĝenaj popoloj rajtas havi aliron al financa kaj teknika helpo de Ŝtatoj kaj per internacia kunlaboro, por la uzado de la rajtoj entenataj en tiu ĉi Deklaracio.

Artikolo 40

Indiĝenaj popoloj rajtas je aliro al, kaj akurata decidado per, justaj kaj egalecaj proceduroj por solvado de konfliktoj kaj disputoj kun Ŝtatoj aŭ aliaj partioj, kaj ankaŭ al efikaj solviloj por ĉiuj lezoj de iliaj individuaj kaj kolektivaj rajtoj. Tia decidado donu taŭgan konsideron al la kutimoj, tradicioj, reguloj kaj juraj sistemoj de la koncernaj indiĝenaj popoloj kaj de la internaciaj homaj rajtoj.

Artikolo 41

La organoj kaj specialigitaj instancoj de la sistemo de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj interregistaraj organizaĵoj kontribuu al plena realigo de la provizoj de tiu ĉi Deklaracio per mobilizo, interalie, de financa kunlaboro kaj teknika helpo. Rimedoj por certigi partoprenon de indiĝenaj popoloj pri aferoj kiuj rilatas al ili estu starigataj.

Artikolo 42

Unuiĝintaj Nacioj, ĝiaj institucioj, inkluzive de la Konstanta Forumo pri Indiĝenaj Demandoj, kaj specialigitaj instancoj, inkluzive je la landa nivelo, kaj Ŝtatoj antaŭenigu respekton al, kaj plenan aplikon de la provizoj de, tiu ĉi Deklaracio kaj kontrolu la efikecon de tiu ĉi Deklaracio.

Artikolo 43

La rajtoj rekonataj ĉi-dokumente konsistigas la minimumajn normojn por la transvivo, digno kaj bonfarto de la indiĝenaj popoloj de la mondo.

Artikolo 44

Ĉiuj rajtoj kaj liberecoj rekonataj ĉi-dokumente estas egale garantiataj al viraj kaj virinaj indiĝenaj individuoj.

Artikolo 45

Nenio en tiu ĉi Deklaracio estu interpretata kiel redukto aŭ elimino de la rajtoj kiujn indiĝenaj popoloj nuntempe posedas aŭ povus akiri estontece.

Artikolo 46

1. Nenio en tiu ĉi Deklaracio estu interpretata kiel implico ke iu Ŝtato, popolo, grupo aŭ persono rajtu entrepreni iun aktivecon aŭ faru iun agon kontraŭan al la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj aŭ kiel rajtigo aŭ kuraĝigo de iu ajn agado kiu dismembrigus aŭ reduktus, tute aŭ parte, la teritorian integrecon aŭ politikan unuecon de suverenaj kaj sendependaj Ŝtatoj.

2. En la uzo de la rajtoj esprimitaj en la nuna Deklaracio, la homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj de ĉiuj personoj estu respektataj. La uzado de la rajtoj prezentitaj en tiu ĉi Deklaracio estu subordigitaj nur al tiuj limigoj jure fiksitaj kaj konformaj al internaciaj homrajtaj devigoj. Eventualaj tiaj limigoj estu nediskriminaciaj kaj estu strikte necesaj al la celo akiri taŭgajn rekonon kaj respekton al la rajtoj kaj liberecoj de aliaj personoj kaj konformon kun la justaj kaj plej nepraj bezonoj de demokrata socio.

3. La provizoj elmetitaj en tiu ĉi Deklaracio estu interpretataj konforme al la principoj de justeco, demokrateco, respekto al homaj rajtoj, egaleco, nediskriminacio, bona regado kaj bona konfido.



ALIĜU AL INTERNACIA JURISTA ESPERANTO-ASOCIO

Kiu rajtas esti membro de I.J.E.A.?

- Ordinara membro: devas esti profesia juristo aŭ posedi universitatan aŭ ekvivalentan diplomon pri Juro.
- Membro-studento: devas studi por licenciigo pri Juro.
- Membro-staĝanto: devas staĝi en jura profesio.
- Membro-korespondanto: devas utile kunlaboradi kun la Asocio, ĉu esperanto, ĉu alilingve, jen spontane, jen laŭ invito de la Asocio.

Kiel aliĝilo plenumu la sekvantan paĝon kaj sendu ĝin al
jurista@esperanto.ac

Kotizoj.

La jara kotizo kostas 7 eŭrojn se vi loĝas en iama socialisma lando de Orienta Eŭropo, Azio (escepte de Israelo, Japanio kaj Korea Respubliko), Afriko aŭ Latin-Ameriko. Se vi loĝas en alia lando la kotizo estas 14 eŭrojn.

Membro-studentoj aŭ membrostaĝantoj pagas neniom.

Eblas pagi al UEA-konto ejax-r. Ankaŭ oni povas aboni la jaran kotizon rekte okaze de la Ĝenerala Asembleo kiu ĉiu-jare okazas kadre de la Universala Kongreso de Esperanto.

Se kotizi kaŭzus al vi transpagajn aŭ ekonomiajn malfacilojn, bv. skribi pri tio al nia adreso: *jurista@esperanto.ac*





Internacia Jurista Esperanto-Asocio I.J.E.A.

ANIĜILO / MEMBRILO

Foto

Antaŭnomo:

Familia nomo:

Profesio:

Poŝtadreso:

Retadreso:

@

Urbo:

Lando:

Nacieco:

Kategorio de estonta asociano: ordinara asociano jurstudento
staĝanto korespondanto

Mi, pere de ĉi tiu peto, kandidatiĝas al la statuso de membro de IJEA obeonte ties statuton kaj pagonte la ĉi-suban kotizon.

Jarkotizo (se ordinara membro de ne-esceptaj landoj) 14 eŭroj
(se ordinara membro de iamaj socialismaj
orient-eŭropaj landoj, Azio -escepte Koreio,
Japanio kaj Israelo), Afriko kaj Latinameriko..... 7 eŭroj

Pagmaniero: Eblas ĝiri al UEA-konto **ejax-r**

Subskribo de la kandidato

Decido pri la kandidateco
per subskribo de IJEA estrarano

Internacia Jurista Esperanto-Asocio
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo